

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Mortis Karolo Piĉ
Dek unu honorigitoj
Ameriko kongresos

Unesko, nia pli bona duono

Enhavo

- 161 Premio Onisaburo Deguči: Dankesprimo de William Auld
- 162 Unesko kaj la duonigita vicgrafo (Renato Corsetti)
- 164 Internacia Kongresa Universitato
- 165 Honora Patrona Komitato: Denove pli ol dek patronoj
- 166 Honoraj Membroj: Naŭ novaj distingitoj honoras la movadon
- 167 Nekrologo: Karolo Piĉ (1920-1995)
- 168 Someraj eventoj: Tamen multa dancado en la IJK
(Bill Mak, Sjoerd Bosga); Relativa sukceso en Ĉinio
(Ooŝida Takeŝi); ILEI pri propedeŭtiko (Marija Beloŝević;
Skoltoj: Ĉu rekomenco? (Arie kaj Marlène Bouman, Emmanuel
Djikoune); Brila kongreso, sed pliaĝiĝo; Kongreso kun kardinalo
- 171 Ameriko: Kongresu centre de la mezo (Jorge Antonio Leoni
de León); Brazilo: Federacia tendenco
- 172 Recenzoj: *Comprehensive English-Esperanto Dictionary*
(Edmund Grimley Evans); *Grand Dictionnaire Français-Espéranto*
(Erich-Dieter Krause); *Dicționar esperanto-român* (Ionel Oneț)
- 174 Laste aperis; Kio plej vendiĝis en Tampere?
- 175 Foliume
- 176 Loke – Fake – Persone
- 178 Kotiztabelo de UEA por 1996
- 179 Nekrologoj: Kiril Drajev (1904-1995)
Oficiala Informilo
- 180 Anoncetoj; Str-angulo: Centoj da E-libroj rubujen
(Joan Marimon, Hektor Alos)

Vi trovos

bukedon da raportoj pri someraj arangoj (p. 168-171; pluaj venos en novembro) kaj, bedaŭrinde, multajn nekrologojn. La sola konsolo pri tio — se ekzistas konsolo — povas esti ke la averaĝa vivdaŭro de esperantistoj, laŭ atesto de nia nekrologa rubriko, superas 80 jarojn.

UEA, kiel sciate kaj legate sur la kovrilpaĝo de ĉiu numero, estas en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko. Por profiti el tiuj rilatoj, necesas koni la celojn kiujn tiuj organizoj fiksas por si kaj plenumas. Membroj de la Esperanta Unesko-asocio (Monda Kunagado, B.P. 3019, FR-69394 Lyon Cedex 03, Francio) eble ne ekscios novaĵojn, sed por ni aliaj Renato Corsetti senmistifikigas la funkcion de Unesko sur p. 162-64.

En septembro ni promesis ke ĉi-monate ni prezentos la anojn de la nova UEA-Estrararo. Sed ĉar dume decidiĝis ke ili baldaŭ kunsidos en Roterdamo, ni atendas tiun okazon por intima konatiĝo. Intertempe legu abunde biografiojn: de la novaj Honoraj Patronoj (p. 165) kaj Honoraj Membroj (p. 166-67).

La kovrilo: Unesko subtenis ĉi tiun legipovigan kurson en la regiono kie Nilo fontas. (Unesko/D. Roger)

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establiĝita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 33; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anoncarifito (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Osmo Buller.

Estrararo de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎ +82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; faks. +82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; retpoŝto: keast@soback.kornet.nm.kr.

Vicprezidanto (disvastigo/informado): Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko, ILEI): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario (eksteraj rilatoj, strategia planado): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎ +1-613-565-9282 [of/h]; faks. +1-613-565-9279 [of/h]; retpoŝto: mfettes@magi.com.

Estrarano (financa politiko, buĝeto): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎ +31-5284-1214 [h], +31-50-613769 [of]; faks. +31-50-613763 [of]; retpoŝto: azgiow6!fred@relay.nl.net.

Estrarano (disvastigo/informado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎ +370-7-738776 [h], +370-7-208242 [of]; faks. +370-7-204970 [of].

Estrarano (kongresoj, kulturo, TEJO): s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-6-39-72-61-98 [h]; faks. +39-6-39-72-61-69 [h]; retpoŝto: mc8750@mcclink.it.

Estrarano (faka kaj scienca agado): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎ +972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; faks. +972-2-658-4437 [of]; retpoŝto: amri@vms.huji.ac.il.

Dankesprimo de William Auld

“Kial vi dediĉas tiom da tempo kaj energio al la afero Esperanto?” Konfrontite al simila demando, ĉiu el ni povas ĉerpi inspiron el la vortoj de William Auld, la ĉi-jara premiito de Premio Deguči. Jen lia dankparolado laŭlegita en Tampere, kun apenaŭaj mallongigoj.

Ricevante tiun ĉi premion, mi spertas samtempe fieron kaj humilon. De tempo al tempo homoj starigas al mi demandon: Kial vi dediĉas tiom da tempo kaj energio al la afero Esperanto? Ĉiam denove mi pripensas, kaj ĉiam denove mi trovas abundajn kialojn.

Elstara motivo estas lojaleco al tiu mirinda homo, d-ro Zamenhof. El ĉiuj proponintoj de projektoj de internacia lingvo, li estis la sola, kiu traktis la problemon serioze kaj praktike. Kompare kun li, ĉiuj aliaj estis kaj estas diletantoj, hobiistoj, teoriemuloj, por kiuj la internacilingva problemo estas afero flanka, afero fine ne serioza. Laŭ ili, la mondo bezonas nur lingvon “helpan” — kio signifas kodon evidente malsuperan al la netuŝebla majestaj naciaj lingvoj, uzotan nur pigine en okazoj, kiam nenio alia efikas. Ĝi estu la lasta ŝanco. Ne venas al ili en la kapon, ke lingvo, por esti lingvo, bezonas antaŭ ĉio homojn, kiuj ne nur parolas ĝin sed ankaŭ pensas, sentas, spertas kaj amas per ĝi, por kiuj ĝi estu la “dua unua” lingvo, eĉ se troviĝas ankaŭ aliaj, kiuj uzas ĝin nur balbute, sed tamen uzas ĝin. Tiam internacian lingvon multaj homoj eĉ ne deziras, kaj tial ofte asertas, ke ĝi nek ekzistas nek eblas.

Sed jam de la komenco Zamenhof konstatis, kaj sentis en koro kaj cerbo, ke la sennombraj lingvoj en la mondo ne nur disigas sed ofte ankaŭ malamikiĝas la homojn; kaj li celis krei lingvon realan, kapablan esprimi, eĉ emocii, ĉion, kion esprimas la aliaj lingvoj, ĉar li firme kredis pri ia baza universala homeco, sur kiu la genta aparteno estis hazarda superstrukturo kovranta tiun homecon. Per neŭtrala homfarita lingvo eblas penetri la superstrukturen kaj atingi tion, kio estas home komuna.

Al tiu celo li do dediĉis sian vivon, je kosto de sia materiala bonstato. Li plurfoje rifuzis atentindajn monsumojn, kiuj estis esence subaĉetoj kaj kompromitus la fideindecon de nia lingvo. Mi mem iam diris al mia filo: “Esperanto estis mia kariero; instruado estis nur mia metio”. Ion similan — sed algrade pli trafe — estus povinta diri Zamenhof. Li estis genia artisto, kaj al sia arto li sin transdonis kun la neŝancelebla direktiĝo de tia geniulo. [...]

Tial estis neeble al mi dum mia vivo perfidi tiun mirindan homon, kies klarvido, obstino, celtrafo kaj esenca homeco, kaj la modesto kiu animis ilin, estas tiom profunde admirindaj. Al tiu homo kaj al Esperanto mi neniam povus turni la dorson.

Ligas min al Esperanto ankaŭ la fakto, ke la esperantistoj estas pravaj. Tio, kion ni pretendas rilate nian lingvon, estas vera, konstatebla kaj pruvebla. Kaj tial senĉese min agacis kaj obstinigi tiuj, kiuj diras pri Esperanto malveraĵojn. Tiaj estas la t.n. sciencistoj, kiuj traktas Esperanton tute nescience, rifuzante ekzameni objekte

la fenomenon pri kiu ili verdiktas surbaze de antaŭjuĝoj kaj senbazaj supozoj. Tiaj estas politikistoj, kiuj regas nin kaj la mondon, ne povante paroli rekte unu al alia, kontentaj dependi de multekostaj kaj neekzaktaj interpretado kaj tradukoj, kontentaj pri duagrada komunikigo. Tiaj estas enciklopediistoj, kiuj plej ofte invitas kunlaboron pri la rubriko “Esperanto” de homoj nekompetentaj pri la temo, kiuj estas liberaj aserti plej fantaziajn malveraĵojn. [...] Fronte al tia traktado mi neniam povis turni la dorson. La esperantistoj pravas!

Trie, ligas min al Esperanto ties granda esprimivo, kiu ankoraŭ ne estas plene malkovrita. Esperanto memorigas min pri la angla lingvo en la 16-a kaj 17-a jarcentoj, kiam ĝi estis elasta, kolorplena kaj vigla, same juna kaj freŝa kiel la nuna Esperanto. La angla estas mia denaska lingvo, kaj mi amas ĝin. Ĝuste tial mi konstatas kun fortega tristo ĝian nunan dekadencan, kiun mi ne volas analizi ĉi tie. Sed tiom pli valoras al mi la elasto, kolorpleno kaj viglo de Esperanto, ties precizeco kaj ties subtilo, neimageblaj por tiuj, kiuj ne spertis ilin. Al tio mi neniam volus turni la dorson.

Laste mi menciu la amikecon. Dum mia vivo mi akiris multoble pli da veraj amikoj

ol mi akiris per mia lingvo denaska. En dekoj da landoj tra la mondo loĝas individuoj, kiujn mi fieras kalkuli kiel miajn intimajn amikojn. Sen Esperanto io simila apenaŭ imageblas. Ne nur tio, sed uzante Esperanton mi akiris usonan amikon, kun kiu mi atingis rilaton preskaŭ fratecan: ni travivis multon kune, ĉu gajan, ĉu tristan, kaj ni fidis komplete unu la alian. Kaj ni interkonsentis, ke se ni uzas la anglan anstataŭ Esperanton, tia rilatiĝo estus multe pli malfacile atingebla, eventuale preskaŭ neebla, ĉar niaj respektivaj elparoloj de la lingvo teorie komuna kunportus tro multajn stereotipajn antaŭjuĝojn. [...] Tion povis tute forviŝi Esperanto. Tia estas la potenco de la internacia lingvo, kaj tial niaj pioniroj nomis ĝin “kara”.

Do per plena koro mi dankas tiujn, kiuj aljuĝis al mi tiun ĉi premion. Aparte kortuŝas min, ke ĝi portas la nomon Onisaburo Deguči, alia admirinda homo, kiu inspiris gravan kaj influan movadon. Ĝi memorigas min pri mia mallonga restado en Kameoka, kie interalie mi, homo senreligia, travivis sperton inspire spiritan, partoprenante Oomotan diservon. [...]

Mi estas fieraj, ke miaj samideanoj rekonas min. Sed samtempe mi sentas min humila, ĉar mi pensas pri la centmiloj da bonaj homoj, kiuj dum pli ol jarcento dediĉis sin al nia afero kaj tre ofte oferis multe pli ol mi, foje eĉ sian vivon, nome de tiu grandioza koncepto. Humila, tamen fieraj, ke mi staras inter ili, kiel ajn modeste.

William Auld



Unesko kaj la duonigita

Kion faras Unesko? Renato Corsetti klarigis tion dum la Tamperea UK en prelego, kies esencajn punktojn ni represas.

Elekti titolojn estas arto kiun nur malmultaj havas, certe ne mi. Ĉi tiu eseo povus, ekzemple, havi ĵurnalisman titolon: “Unesko: la moderna Donkiĥoto” aŭ akademie precizan titolon: “Kelkaj konsideroj pri la relativa sukceso aŭ/kaj malsukceso de la iniciatoj de Unesko dum la pasintaj kvindek jaroj”. Mi elektis, tamen, ludi per la titolo de novelo de itala verkisto, Italo Calvino.

Calvino rakontas ke iam estis vicgrafo kiu batalis kontraŭ turkoj. En unu el la bataloj li estis dividita je du partoj pro frapego de sabro. La du duonigitaj vicgrafoj revenis hejmen sendepende, sed pro iu mistero unu el la du partoj enhavis ĉion bonan de la antaŭa vicgrafo, dum la alia parto enhavis ĉion malbonan.

Mi uzis ĉi tiun metaforon ĉar Unesko funkcias kiel la bona parto de la homaro, kiu entreprenas multajn noblajn celojn kaj iniciatojn. Tamen ni daŭre pensu ke ekzistas ankaŭ la alia, malbona parto de ni.

Unesko mallonge

Unesko funkcias kiel faka instanco de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo. En la lastaj jardekoj unu plia branĉo aldoniĝis: temas pri Komunikado.

La ĉefa celo de Unesko estas tre bele resumata per frazo en ĝia fondo-dokumentoj: “. . . militoj naskiĝas en homaj mensoj, kaj pro tio en homaj mensoj oni devas konstrui paco-defendilojn”. Povas esti interese vidi kiel Unesko interpretas en la praktiko tiun frazon.

Edukado

La tri ĉefaj celoj de Unesko rilate edukadon estas:

- havigi al ĉiuj homoj bazan edukon (kaj, do, venki analfabetecon);
- eduki homojn por la 21-a jarcento (kaj igi eduksistemojn pretaj fronti la defiojn de la nuntempa teknika progreso);
- plibonigi eduk-sistemojn kaj -metodojn. Unesko helpas la membrajn ŝtatojn plibonigi siajn lerneajn sistemojn kaj igas la malsamajn ŝtatojn kunlabori tiurilate.


Scienco

Unesko iniciatis la jenajn, nun funkciajn, interŝtatajn projektojn sciencajn:

- Interregistara Ocean-priskriba Komisiono;
- programo pri homo kaj biosfero;
- internacia programo por geologia kunligiĝo;
- internacia programo pri akvo.

Krome Unesko laboras je du propraj projektoj:

- la programo Unesko-Ĉernobil, por konsciigi la publikon pri la danĝeroj de atom-centraloj;
- la programo Scienco, Tehnologio kaj Socio, por konsciigi la publikon pri la ligoj inter scienco kaj socio.



En la kazo de homaj sciencoj oni lanĉas apartajn esplorojn pri la unuopaj aliaj celoj de Unesko kunlabore kun instancoj en la membraj ŝtatoj.

Kulturo

La laboroj de Unesko en ĉi tiu fako estas, eble, la plej konataj, ĉar kelkaj havas en si elementojn de spektakleco.

Ni menciigu unue la savon de kelkaj historiaĵoj, kiel la temploj de Abu-simbel en Egiptujo. Nuntempe Unesko partoprenas projekton por la rekonstruo de la biblioteko de Aleksandrio en Egiptujo.


Famas ankaŭ la materialoj surbendigitaj ĉe popoloj sen skriba lingvo.

Inter esperantistoj certe estas konata la Serio Oriento-Okcidento. Ĝi estas la E-lingva kontribuo al la pli ĝenerala serio “Kolekto de Unesko de reprezentaj verkoj”. Temas pri traduko el malmulte konataj lingvoj al la angla kaj al la franca.

Komunikado

Ĉi tie Unesko laboras pere de unuopaj plurjaraj projektoj:

- la “Internacia programo por evoluo de komunikado”, kiu helpis por la naskiĝo de gazetaraj agentejoj en ĉiuj kontinentoj, por la kreo de pluraj lokaj radio-stacioj kaj gazetoj en evoluantaj landoj;
- la “Ĝenerala programo por informado”, kiu celas fortigi en evoluantaj landoj la kapablon utiligi ekzistantajn informojn, starigi bibliotekojn, naciajn arhivejojn, ktp;
- la “Interregistara programo pri informadiko”, kiu ĉefe celas instrui informadikistojn kaj redukti la malsamecojn en ĉi tiu kampo inter evoluintaj kaj evoluantaj landoj.



Sur la tabulo la fama frazo el la fondo-dokumento de Unesko: "... militoj naskiĝas en homaj mensoj, kaj pro tio en homaj mensoj oni devas konstrui paco-defendilojn."

Por pli justaj lingvaj rilatoj

Unu el la gvidaj ideoj tra la unuopaj laborkampoj antaŭe listigitaj estas la ideo pri pli justaj lingvaj rilatoj. Sen iu dubo, dum la pasintaj kvindek jaroj Unesko estis inter la plej firmdecidaj batalantoj por lingva justeco. E-istoj, kompreneble, scias pri la Unesko-rezolucioj pri la internacia lingvo, sed ekzistas amaso da aliaj prilingvaj resolucioj de Unesko, ĉar ekzistas ankaŭ alispecaj lingvaj problemoj preter la lingva problemo, kiu laŭ la e-ista kliŝo "... pli kaj pli akriĝas".

Por gepatraj lingvoj

Unu el la unuaj lingvaj problemoj kiujn Unesko atakis, estas la problemo de la situacio de gepatraj lingvoj. La fundamenta dokumento en tiu kampo datiĝas de 1953 kaj estas surprize klara kaj senkompromisa. "La uzo de la popolaj lingvoj en instruado" simple asertas ke "... estas aksiome klare ke la plej bona rimedo por instrui infanon estas ĝia gepatra lingvo." Pensu pri la politika situacio en 1953. En pluraj koloniaj landoj la senkoloniiga procezo ankoraŭ ne komenciĝis, en aliaj ĝi estis en la armila fazo sen klaraj indikoj pri la fina rezulto.

Tiu dokumento de Unesko apartenas al la plej gravaj socilingvaj dokumentoj de ĉi tiu jarcento. Ĝi sen nuancoj asertis ke la tempo de instruado pere de la koloniaj lingvoj devas finiĝi.

Ĝi donis kuraĝon al ĉiuj batalantoj por instruado pere de gepatraj lingvoj. Tia instruado, asertas ili — kaj

ni, esperantistoj —, estas unu el la fundamentaj homaj rajtoj.

La batalo, tamen, estas nek facila nek ankoraŭ findecidita. De tiam Unesko daŭre subtenis ĉiujn klopodojn uzi lokajn lingvojn en instruado. La konferencoj de edukministroj de ĉiuj mondopartoj pri ĉi tiu problemo estas jam sennombraj.

Aparte multe estis farita por afrikaj lingvoj, per subteno de dekoj da seminarioj kaj fakaj renkontiĝoj, interalie ankaŭ pri provizado de alfabetoj en nur parolaj lingvoj.

Per la helpo de Unesko laboras Scienca Komisiono pri Instruado de Gepatraj Lingvoj de la Asocio Internacia de Lingvistiko Aplika, kaj ĝi ne trovas iun ajn alian taŭgan instancon al kiu direkti siajn rezoluciojn. En ĉi tiu kadro trovas lokon ankaŭ la klopodoj protekti malplimultojn. Malmultaj batalantoj por etnismo scias ke Unesko okupiĝas pri malplimultoj kaj ties lingvaj rajtoj.

Por pli da fremdlingvo-instruado

Plua laborkampo de Unesko estas instruado de fremdaj lingvoj, same koncerne ties metodikajn problemojn kiel la elekton de la studotaj fremdaj lingvoj.

La unua evento ankaŭ en ĉi tiu kampo venas de 1953: Internacia Seminario pri Instruado de Lingvoj, okazinta en Nuwara Eliya, Srilanko. Kaj en 1955 oni aperigis la libron *La instruado de vivantaj lingvoj*.

Unesko ĉiam tenis rilatojn kun pluraj asocioj de instruistoj de fremdaj lingvoj. Ekzemple, en 1962 la Unesko-Instituto pri Pedagogio de Hamburgo aranĝis tre vaste ĉeestatan seminarion pri frua instruado de lingvoj. Kaj sinsekve ĝis nun Unesko ĉiam tuŝis en siaj kunvenoj temojn ligitajn al instruado de lingvoj. En kelkaj kazoj ĝi eĉ eldonis librojn en kiuj oni ne evitas "politikajn" problemojn pri elektado de lingvoj en lernejoj.

Ni ne forgesu ankaŭ la pli modestajn agadojn, kiel Lingvapax, kiu ĝuste baziĝas sur instruado de lingvoj kiuj iĝas komunik-rimedo inter diverslandaj lernantoj.

Por la internacia lingvo Esperanto

Du ĝeneralaj asembleoj, en Montevideo (1954) kaj en Sofio (1985), alprenis rezoluciojn favorajn al Esperanto. En la lasta asembleo en Parizo (1993) simila rezolucio propono estis pritraktita, kvankam ĝi ne alvenis al formala akcepto.

Ofte en la pasinteco Unesko estis reprezentita en niaj Universalaj Kongresoj (unu fojon de la ĝenerala direktoro mem), kaj ĉiam niaj kongresoj ricevis kuraĝigajn mesaĝojn de Unesko (laste vd. sept., p. 144).

Siavice UEA uzis siajn konsultajn rilatojn dum la lastaj jardekoj por interveni pri pluraj diskutataj punktoj kaj por ricevi helpon en apartaj kazoj (kiel ekzemple stipendio por juna afrikano kiu volas spertiĝi pri Esperanto en Eŭropo).

Ĝustigo

El la teksto de la kongresa rezolucio (sept., p. 157) elfalis tri vortoj:

"substrekas la nepran bezonon aktualigi la Ĉarton de UN por respondi al nuntempaj postuloj kaj aperontaj defioj, inkluzive ĝian demokratiigon kaj rekonsideron de la principo de senkondiĉa ŝtata suvereneco ..."

Unuvorte eblas diri ke la nura internacia organizaĵo kiu rilatis al Esperanto kun relativa favoro post la dua mondmilito, estis Unesko. Tio ne ŝajnu malmulto, en periodo kiam Esperanto ne ĝuis altan prestiĝon.

Tamen malgraŭ Unesko

Cinikuloj ŝatas tamen aserti ke malgraŭ Unesko kaj ĝiaj rezolucioj nenio vere solviĝis en la koncernaj kampoj.

Granda sukceso de Unesko estas la kampanjo por forigi analfabetecon. Almenaŭ principe ĉiuj en la mondo nun akceptas ke kaj knaboj kaj knabinoj devas viziti lernejon kaj lerni legi kaj skribi. Analfabetecon certe ne estas tute forviŝita de sur la terglobo, sed oni povas aserti ke almenaŭ la precipa batalo estas gajnita.

Pri la uzado de gepatraj lingvoj en edukaj sistemoj oni povis konstati progresojn en kelkaj landoj en la 60-aj kaj 70-aj jaroj, sed malprogresojn en la 80-aj en multaj evoluantaj landoj, kies edukaj sistemoj ĝenerale plu tenis la ideon ke estas multe pli simple uzi la ekskoloniajn lingvojn.

Tion oni pravigas plurargumente. Eŭropaj lingvoj evitas la problemojn de intertnaj kvereloj pro superrego de unu etna lingvo, ili malfermas pli grandajn eblojn por postaj studoj, ili estas ilo de progreso ktp.

Pri instruado de fremdaj lingvoj oni ne povas diri ke atentindaj rezultoj estis atingitaj. Pri la instrumentoj oni daŭre baraktas kaj daŭre anoncas miraklajn novajn metodojn, sed lernado de fremdaj lingvoj restas problemo same granda nun kiel ĝi estis en la eŭropa mezepoko aŭ antaŭ ol Unesko komencis rezolucii pri ĝi.

Same pri la vastigo de la gamo de lernindaj fremdaj lingvoj, ŝajnas evidenta la malsukceso de la Unesko-rezolucioj. En neniuj antaŭa epoko la deziroj de la publiko lerni nur unu lingvon — tiun kiu promesas pli da tujaj avantaĝoj — estis same evidenta. Do, ĉiuj belaj deziroj pri lernado de multaj lingvoj kaj — pere de ili — de multaj kulturoj restas nur belaj deziroj.

En la fako “kulturo” Unesko akiris sukcesojn. Sed ĉu la konsciigo pri kulturo kiel parto de evoluo estas pli alta nun, post la interveno de Unesko? Eble, sed malfacilas mezuri tion. Ĉu plia ĝisfunda studo pri la vojoj de silko inter Oriento kaj Okcidento kontribuos al pli granda reciproka interkonatiĝo?

Index “Translationum” (Registro de tradukoj) estas ofte citata, do eble ĝi plenumas iun inform-bezonon, dum la serio de reprezentaj verkoj ne ŝajnas havi grandan publikon.

La kampo en kiu la malsukceso de Unesko estis plej evidenta, tamen, estas tiu de komunikado. En la komenco oni celis batali kontraŭ la tro granda potenco de la okcidentaj amas-komunikiloj, kiuj prezentas al la tuta mondo la tutan mondon tra siaj okulvitroj. Kiam la celoj de Unesko iĝis klaraj, pluraj okcidentaj landoj rifuzis kunlabori. Vi mem povas juĝi ĉu hodiaŭ la “informa entreprenaro” de Usono (ĉar pri tiu temo) estas pli aŭ malpli potenca ol antaŭ dudek jaroj.

Do, ĉu ni konkludu ke Unesko malsukcesis? Ĉu ni konkludu, kiel kelkaj homoj deziras, ke la mono elspezita de Unesko estis simple forĵetita?

Mi kredas ke ne.

Mi kredas ke la tuta afero funkcias kiel la du duonoj de la vicgrafo, unu ekstreme bonkondukta kaj unu ekstreme malbonkondukta.

La registaroj pagas sian kontribuon al Unesko, kaj sendas al ĝi siajn plej idealismajn reprezentantojn por ke ili formulu kaj aprobu tre belajn rezoluciojn. Ili ankaŭ starigas naciajn Unesko-komisionojn kun grandaj idealoj kaj tre malgrandaj praktikaj rimedoj. Per tio ili trankviligas sian konsciencon.

Do Unesko, kaj ĉiuj homoj ĉirkaŭ ĝi, reprezentas la bonan konsciencon de la homaro, kaj per siaj rezolucioj diras al la mondo kion oni devus fari, se oni volus pacon kaj evoluon por ĉiuj. Ili ne povas fari ion plian, kaj iliaj registaroj lasas agi la aliajn fortojn, la malbonan duonon de la homaro (laŭ mi, ĉar laŭ aliaj tiuj estas la sanaj fortoj de la merkato), kiuj havas tute malsamajn interesojn — kaj la rimedojn por efektivigi siajn celojn. Ili plu instruas la koloniajn lingvojn aŭ vendas la usonajn televid-programojn al evolulandoj, kiuj iĝas ĉiam pli dependaj de la evoluintaj. Unesko kaj ĝiaj apogantoj ne povas fari multon kontraŭ ĉi tiuj fortoj, ĉar la fortorilato estas proksimume unu je cent.

Do, ne Unesko kulpas pri la relativa malsukceso de siaj kampanjoj, sed la homoj kiuj kontraŭagas tiujn.

Ĉu ankaŭ en la realo okazos kiel en la novelo?

En la novelo de Calvino la du duonoj de la vicgrafo reunuiĝas en la fino, kaj la vicgrafo estas iomete bona kaj iomete malbona, kiel ni ĉiuj.

Ĉu ankaŭ la du duonoj de la homaro, kiuj havas malsamajn ideojn pri la agadoj de Unesko, sukcesos iam reunuiĝi? Mi opinias ke ne. La fortoj de la bono (bono, mi reemfazas, laŭ mi kaj ĝenerale laŭ esperantistoj) kiuj agas ĉirkaŭ kaj por Unesko, plu batalos por plialtigi la internaciajn kondukto-normojn en la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo. La malaj fortoj plu batalos por certigi la ĝuadon de siaj privilegioj surbaze de sia “sankta egoismo”.

Ni povas nur bondeziri al Unesko kaj al la homaro ke la batalo estu pli honesta kaj ke Unesko havu pli da praktikaj rimedoj. Ĝi kiel UEA havas la forton de idealismo, sed, kiel ni scias, idealismo sen materiaj rimedoj ne ĉiam gajnas.

Renato Corsetti (Italio)

Internacia Kongresa Universitato

En Prago havos lokon la 49-a sesio de IKU, kie rajtas prelegi universitataj profesoroj, lekciistoj, aŭ simile kvalifikitaj personoj. Ili estas invitataj sendi siajn prelegproponojn al la sekretario de la IKU-komisiono, prof. d-ro Hans Michael Maitzen (Endemanngasse 6-18/1/24, AT-1230 Wien, Aŭstrio): maks. 200-vortan resumon de sia prelego, plus simillongajn biografion kaj bibliografion. La prelegoj prefere (ne devige) rilatu al la kongresa temo “Kulturo — valoro aŭ varo?”. La elektitaj prelegantoj ricevos modestan honorarion, sed ne repagon de la vojaĝkostoj, kaj ili devos mem aliĝi al la kongreso. Aparte bonvenas kandidatoj junaj aŭ ankoraŭ ne prelegintaj en IKU. *Limdato por kandidatigo:* 15-a de januaro 1996.

Aldone al la tradiciaj IKU-prelegoj, Akademio Internacia de Sciencoj de San Marino kaj UEA okazigos specialajn universitatajn kursojn de AIS. Temas pri prelegoj, je populara nivelo, kiuj konsistigu seshoran koheran kurson pri temo pli vasta ol permesas la kutima IKU-kadro. Ankaŭ ĉi-temajn proponojn sendu al la supra adreso.

Denove pli ol dek patronoj

"Lingvistoj, sciencistoj kaj aliaj eminentaj personoj kiuj faris gravajn servojn al la Esperanto-movado kaj mem parolas la internacian lingvon" povas fariĝi, laŭ la koncerna regularo, membroj de la Honora Patrona Komitato. Kvankam eminentuloj ne mankas en kaj ĉirkaŭ la movado, de post 1988 la konsisto de ĉi tiu elita grupo ŝanĝiĝis nur malkreske, pro forpasoj. En Tampere la Komitato de UEA fine elektis du novajn Honorajn Patronojn.



Humphrey TONKIN (Usono) naskiĝis la 2-an de decembro 1939 en Kornvalo (Britio), sed vivas jam tridekon da jaroj en Usono. Li studis anglan literaturon en Kembrigo (Britio) kaj doktoriĝis en Harvard (Usono). Tonkin profesoris en la Universitato de Pensilvanio antaŭ ol gast-profesori (1980-81) pri la angla kaj kompara literaturo en Universitato Columbia (Novjorko) kaj fariĝi prezidanto de kolegio de la Ŝtata Universitato de Novjorko (1983-88) kaj poste (1989-) prezidanto (rektoro) de la Universitato de Hartford. Li ĉiam tre aktivis en universitataj kaj aliaj edukaj forumoj en Usono, kun aparta intereso pri internacia kunlaboro. Li estas prezidanto de du gravaj edukaj instancoj: Konsilio de Internacia Interŝanĝo de Universitatoj (kiu administras la konatan Fulbright-programon) kaj Ligo por Servo-Studado, kaj li aktivis en la estraroj de aro da aliaj instancoj. Li aperigis plurajn anglalingvajn verkojn en siaj diversaj fakoj.

Tonkin lernis E-on kiel studento en Kembrigo kaj tuj aktivigis en la studenta kaj junulara E-movado. Li estis

prezidanto de TEJO (1968-71) kaj la unua redaktoro de la revuo *Kontakto* (1963-66), kiun li mem iniciatis. Li servis kiel estrarano de UEA (1974-1989), prezidanto dum tri mandatoj (1974-80 kaj 1986-89), kaj komitatano (1964-71, 1974-).

Tonkin estas granda organizanto kaj inspira gvidanto al kiu UEA ŝuldas tutan aron da gravaj reformoj, iniciatoj kaj atingoj. Li ĉefmotoris la el-laboron de la nunaj Statuto kaj Strategia Plano. Li iniciatis la mecenatan klubon Societo Zamenhof, lanĉis la serion de E-dokumentoj (por poste verki kaj redakti multajn el ili), li fondis la Novjorkan Oficejon de UEA, modernigis la fakan revuon *Language Problems & Language Planning* kaj ankoraŭ nun ĝin kunredaktas. Tonkin estas direktoro de Centro de Esploro kaj Dokumentado kaj en tiu rolo organizis plurajn CED-konferencojn en Novjorko, kiuj siavice lanĉis serion da fakaj libroj pri la lingvo-problemo (aperantaj ĉe nemovada eldonejo), plurajn el kiuj li mem redaktis.

Li aktivis ankaŭ kiel esperantologo kaj aŭtoris la verkon *Esperanto and International Language Problems: A Research Bibliography*, kiu jam havis kvar eldonojn. Li editoris la tradukon de la fama verko *Winnie-la-Pu* de A. Milne (1972, 1992) kaj la anglan eldonon (1991) de *Esperanto: lingvo, literaturo, movado* de P. Janton, kiun li kuntradukis. Jam de pluraj jaroj Tonkin prilaboras la Esperantan sekcion de la prestiĝa faka bibliografio de la usona Asocio pri Modernaj Lingvoj. Malfacilas nombri liajn Esperantajn artikolojn, studojn kaj paroladojn. Li membras en la Akademio de Esperanto.

Tonkin sendube estas la plej elstara personeco en la E-movado dum la lastaj du jardekoj.

Reinhard SELTEN (Germanio) naskiĝis la 5-an de oktobro 1930 en Breslau (nun Wrocław, Pollando). Li studis kaj doktoriĝis (1961) pri matematiko en Frankfurto, kie li inter 1957 kaj 1967 laboris en ekonomika esplorgupo. En 1967/68 Selten estis gast-profesoro ĉe la Universitato de Kalifornio en Berkeley (Usono). Li profesoris ĉe la Libera Universitato de Berlino (1969-72), kaj ĉe la universitatoj de Bielefeld (1972-84) kaj Bonn (ekde 1984). En oktobro 1994 Selten fariĝis (kun du usonaj ekonomikistoj) laŭreato de la Nobel-premio pri ekonomiko pro sia pionira kontribuo al la ludo-teorio. En lia ampleksa scienca bibliografio (ĉefe en la germana kaj angla) troviĝas la verko (kun J. Pool) *Ĉu mi lernu Esperanton? Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj* (1982).

Pri sia esperantistigo Selten rakontas jene: "Mi komencis lerni Esperanton en 1946/47, aŭtodidakte. Mia patro estis esperantisto, sufiĉe aktiva en la blindula E-movado. Tamen, la lingvon mi eklernis ne sub lia rekta instigo, nur sufiĉe longe post lia morto." En Frankfurto (ĉ. 1960) li ekzamenigis kiel E-instruisto, gvidis kurson kaj estis vicprezidanto de E-klubo. Li konatiĝis kun sia edzino pere de Esperanto kaj instruis la lingvon ankaŭ al sia pli juna frato. Li estas (same kiel la edzino) dumviva membro de UEA de post 1969. Li membras ankaŭ en Germana E-Asocio kaj en AIS. La esperantisteco de Selten estis ofta temo en liaj multnombraj intervjuoj okaze de la Nobel-premia distingo, ĉiam kun sobra kaj pozitiva prinoto. ★



Naŭ novaj distingitoj honoras la movadon

Vortaristo, verkistoj, tradukistoj, mecenatoj, organizantoj. Virinoj kaj viroj, plejparte ĉirkaŭ sia 80-a vivjaro. Eŭropanoj, amerikanoj, aziano. La Esperanta movado dankas multon al la tre diversspecaj talentoj de la naŭ homoj kiuj kreskigis la Honoran Membraron en Tampere.



George ABRAHAM
(Argentino, 1916, 1931)*
Kunfondis en 1941 Argentinan Esperanto-Ligon, en kiu li servis kiel vicprezidanto kaj konsilanto dum

pluraj mandatoj. En 1952 li gvidis la unuan E-kurson en Venado Tuerto, kie de tiam funkcias E-klubo. Li tradukis el la araba kvar librojn de la libana verkisto Ĥalil' Ĝibran'. Pluraj liaj E-lerniloj publikigis en Argentino kaj Brazilo. Tamen, liaj ĉefverkoj restas ĝis nun manuskriptaj: E-lernolibro por araboj, kaj ampleksaj vortaroj araba-E kaj E-araba, por kies eldono UEA delonge klopodas trovi rimedojn.



Barbara CVETKOVA
(Ruslando, 1910, 1928)
Pasigis en Sankt-Peterburgo malfacilan vivon en la tumultoj de la historio. Ĝis la Stalina malpermeso de Espe-

ranto (1934) ŝi aktive korespondis kun eksterlandanoj. Post plurjardeka trudita pasiveco, ŝi sukcesis vojaĝi al la Universalaj Kongresoj en Vieno (1970), Stokholmo (1980) kaj Varsovio (1987). Ŝi fariĝis la konata "panjo" de la Esperanta vivo en Leningrado, kaj en la pasintaj kvar jardekoj apenaŭ iu esperantisto pasis en tiu urbo sen ĝui ŝian afablan helpon.

*En parentezo aperas sinsekve la loĝlando, jaro de naskiĝo kaj jaro de esperantistiĝo.



Elfriede ERNST
(Belgio, 1910, 1935)
Naskiĝis en Aŭstrio. Jam en 1936 ŝi estis helpanto ĉe la 28-a UK en Vieno. Poste sekvis 33 pluaj UK-oj, inkluzive

la Tamperean. Avertite ke la nazioj malpermesos E-on en Aŭstrio, ŝi translokiĝis al Bruselo kaj tuj aliĝis al la E-grupo tie. Trajardekoj ŝi servis kiel kursgvidanto, protokolisto kaj sekretario. Membro de UEA dum pluraj jardekoj kaj regula ano de Societo Zamenhof, Ernst estas unu el la plej malavaraĵoj apogantoj en Esperantujo, kiu en multaj okazoj mecenate subtenis la belgan kaj la internacian Esperanto-movadon.



Joachim GIESSNER
(Germanio, 1913, 1950)
Fervojisto. Jen eroj el lia movada biografio: diplomita kursgvidanto (1951), sekretario (1953) kaj prezidanto

(1956-ĝis nun, krom 1968-72 vicprezidanto) de la germana fervojista asocio, gvidanto de Fakprelega kaj Historia Komisiono de Internacia Fervojista E-Federacio (IFEFF) (1959-68 resp. 1976-83), LKK-estro de la IFEFF-Kongresoj en Fulda (1967) kaj Regensburg (1981), prezidanto (1968-90) kaj honora prezidanto de IFEFF (1990), redaktoro de *Fervoja esperantisto* (1993-). Ligvidis multajn kursojn, fondis kvar fervojistajn E-grupojn, verkis multajn artikolojn (ĉefe fakajn), kaj donis grandan organizan helpon al la landaj asocioj de IFEFF.

Ekde la 50-aj jaroj li tradukis ĉ. 200 ariojn kaj kantojn diversnaciajn; li esperantigis kaj en 1987 eldonis la romanon *La lastaj infanoj de Oldrovalo* de Gudrun Pausewang.



Adamo GORALSKI
(1912, 1975)
Emerita inĝeni-ero pri kemio, entreprenisto. Li estas polo naskita en la nuna Ukrainio, venezuela civitano, kiu rezi-

das alterne en Kanariaj Insuloj, Venezuelo kaj Pollando. Goralski fariĝis e-isto — kun sia edzino Kristina Krause, pentristino — dank' al kontaktoj kun prof. Juan Régulo Pérez. Ges-roj Goralski kontraktis en 1982 kun UEA pri la starigo de Fondaĵo Grabowski — intertempe unu el la plej gravaj mecenatoj de la E-kulturo —, kiun ili provizis per baza kapitalo kaj daŭre prizorgas. Goralski helpis ebligi la eldonon de *Rumana antologio*, financis konkurson por E-dramo, kaj subtenis multajn valorajn iniciatojn en la E-movado.



HAN Moo-hyup
(Koreio, 1923, 1975)
Emerita generalo. Post la retiriĝo el la armeo, li estris asekur-kompanion dum 15 jaroj kaj fondis

(1979) Korean Katolikan Entreprenistan Asocion. En 1976 li private fondis la revuon *La espero el Koreio* (1976-1994), kiu grave kontribuis al la firmigo de E-o en Koreio. Li kuniniciatis la unuiĝon de Korea E-Asocio kaj Korea E-Centro. Han prezidis Korean E-Asocion dufoje (1978-81 kaj 1991-94) kaj nun estas ĝia honora prezidanto. Li ofte rolis kiel la ĉefa mecenato de la korea E-movado. Dumviva membro de KEA kaj de UEA, li motoris la 79-an UK-on en Seulo kiel LKK-estro.

Karolo Piĉ (1920-1995)



La 15-an de aŭgusto Karolo Piĉ mortis en Litomiŝlo (Ĉeĥio), kie li naskiĝis la 6-an de decembro 1920.

Post abiturientiĝo en gimnazio de la ordeno de piaristoj, li enskribiĝis en la Praga Universitato. Tamen, ĉar la germanaj okupaciantoj ĝin fermis, "post ne longa epizodo dominikan-novica" li revenis al Litomiŝlo, kie li finis unujaran pedagogian kurson kaj en 1941-42 laboris en la urba administracio. En 1943-44 li estis devige sendita al konstru-firmao, kaj punita pro malfrua reveno al la laboro per du monatoj en

reedukejo de Gestapo. Post la milito li plenumis administrajn funkciojn, krom inter 1951 kaj 1953, kiam li devis — estante "nereĝimisto" — denove manlabori kiel lakisto kaj farbisto. De 1953 ĝis emeritiĝo en 1980, li estis dungito de la Ŝtata Fiŝistejo en Litomiŝlo.

Kun Esperanto li konatiĝis en la aĝo de 6 jaroj, ĉar lia patro estis mem entuziasma movadano. Piĉ tamen "neniam fariĝis esperantista funkciulo kaj propagandisto"; trovinte en sia izolula vivo la Esperantan oazon, li sopiris servi la lingvon "sur la fronto de ĝia literaturo". Ekde 1946 aperadis liaj poemoj, recenzoj kaj tradukoj en *Literatura Mondo*, *La Suda Stelo*, *La nica literatura revuo* k.a.

Por sia unua libro li devis tamen atendi ĝis 1981: la pikareska romano *La Litomiŝla tombejo* (reeldono en 1989), nomata poste "la ĉefa Esperanto-romano de la 80-aj jaroj", efikis al la publiko — je pli modesta skalo — kiel *Satanaj versoj* de Rushdie: ĉefe tiuj kondamnis ĝin kiuj ĝin ne legis. Dum kelkaj ja rimarkis ke la lingvo de Piĉ estas la sole adekvata esprimilo por lia spertaro de fremdiĝinto, multajn ŝokis (pli ol la imagoplenaj amor-

scenoj) ĝuste tiu eksperimentema lingvaĵo kiun Piĉ evoluigis kaj mult-esee defendis pro sia konvinko ke Esperanto "ne havas disvolvitan lingvaĵon romanan".

Kun sama lingva esploro li teksis siajn romanojn (aperintajn, kiel ĉiuj liaj verkoj, ĉe la eldonejo Iltis en Saarbrücken) *La mortsonoro de Chamblay* (1983) kaj *Klaĉejo* (1987), kaj la rakontaron *La Bermuda triangulo* (1989). La poemarojn *Angoro* (1982) kaj *Obsedo* (1984) karakterizas pli kutima lingvaĵo.

Piĉ elmetadis siajn lingvajn principojn en ampleksaj postparoloj kaj eseoj, i.a. tiuj en la aperonta esperantologia esearo *La interna vivo de Esperanto*. Kroma deko da liaj libromanuskriptoj ĉiaĝenraj atendas publikigon, inkluzive la literatur-sciencan *Kritiko kaj recenzistiko en Esperanto* (finitan en 1976) kaj la romanon *Ordeno de verkistoj* (1985).

Piĉ estis ano de la Akademio de Esperanto (1973-), fakdelegito de UEA (1974-) pri esperantologio, literaturo kaj lingvistiko, kaj membro de Esperantlingva Verkista Asocio.

Karolo Piĉ estis enterigita la 21-an de aŭgusto en la Litomiŝla tombejo, kies famo daŭros same longe kiel libroj esperantlingvaj estos legataj. ★



Julius J. MANSON
(*Usono*,
1907, 1977)

Emerita profesoro. Kun sia nun forpasinta edzino Elizabeth (1910-1993) li helpis la klopodojn de Humphrey Tonkin por starigi la Novjorkan Oficejon de UEA, malfermitan en 1979. La paro Manson fariĝis baldaŭ reprezentanto de UEA ĉe la sidejo de UN, tasko kiun li ankoraŭ skrupule plenumas spite altan aĝon.



Hugo RÖLLINGER
(*Germanio*,
1905, 1921)

Aliĝis en 1923 al Germana E-Asocio, SAT kaj UEA, kies delegito li iĝis en

1930. (Hodiaŭ li estas la dojeno de la Delegita Reto.) Ekde 1926 li gvidis E-kursojn en sindikataj rondoj, kaj en 1928 li fondis SAT-grupon en sia hejmurbo Ansbach. Post la potencpreno de Hitler li perdis sian laboron pro kontraŭnaziismo. Rekrutita en la germanan armeon en 1943, li kaŝe kunportis paĝojn de la Jarlibro, kaj kontaktis esperantistojn en Francio kaj Nederlando. Nur post la milito li povis komenci profesion karieron, en kiu li avancis ĝis sekciestro de ŝtata sociala asekuro. En 1949 li fondis E-grupon en Bad Kissingen kaj ĝin estras ĝis nun. Dum multaj jaroj li estis regule invitata prelegi ĉe la Universitato La Laguna (Kanariaj Insuloj) kaj en Grésillon. La honorigo dankas precipe lian senlacen laboron kiel kompilanto, ekde 1965, de listo de preskaŭ mil tutmondaj Zamenhof/Esperanto-objektoj, kiu baldaŭ aperos ĉe UEA en libro sub la redaktado de Thomas Bormann.



Eduard V. TVAROŽEK
(*Slovakio*, 1920)

Laboris kiel mezlerneja instruisto de la angla kaj germana lingvoj. Li membras en UEA de post 1937. En la 50-aj jaroj li spertis diversspecajn ĝenojn kaj persekuton pro sia E-agado. Li estis fonda membro de Slovakia E-Asocio, ĝia multjara funkciulo kaj longtempa ĉefredaktoro de *Esperantisto slovakia*. Li aŭtoris plurajn E-lernolibrojn kaj multloke instruis E-on. Lian tradukistan laboron bele ilustras *Slovaka antologio* (1977, 1980) kun pli ol 50 liaj tradukoj. Pro originalaj teatraĵoj kaj poemoj li po trifoje premiigis en Belartaj Konkursoj. En 1992 aperis lia poemkolekto *Sola en sunsubiro* kaj pluraj kajeroj kun ŝercoj, aforismoj kaj anekdotoj. ★

Tamen multa dancado en la IJK

Ĉe la pitoreska marbordo de la Finna Golfo, 303 gejunuloj el pli ol 40 landoj kuniĝis kaj amikiĝis dum la 51-a Internacia Junulara Kongreso apud Sankt-Peterburgo (Rusio).

Malantaŭ ni “La Bamba” daŭre bruegis. Mi agrable babilis kun nova bjelorusa amiko sur balkono. Estis jam preskaŭ la kvina en la mateno — la lasta mateno. Turnante la kapon ni vidis aretojn da junuloj kun bierboteloj ridi, sencele vagadi. Ĉu jen “Aktivismo: junularo, kiu ne nur dancas”, laŭ la vortoj de la kongresa temo?

Inter la 31-a de julio kaj la 7-a de aŭgusto kunvenis en Serovo (apud Sankt-Peterburgo) ne brilokulaj aktivistoj kiuj propagandas pri mondpaco kaj la savo de la malaperantaj arbaroj, lobias pro homaj rajtoj, batalas kontraŭ nukle-armiloj — sed tute ordinarnaj junuloj, muzikemaj, bieramaj, diskotekemaj, kiuj ŝatas malfrue enlitiĝi. Ni ĝuis profesiajn prezentadojn de la kantisto-verkisto Mikaelo Bronŝtejn, de Ĵomart kaj Nataŝa, de la rok-grupo Persone, kaj aliaj. Al la intimeco de la etoso kontribuis la kuna dormado en modesta amasloĝejo, la uzo

de la samaj aĉaj necesejoj (kelkaj senpordaj kaj senpaperaj). La kongreso restis ĉefe distra, la homoj ĉiam ŝajnis pli viglaj vespere, eĉ noktomeze, ol



Jen duono de la nova TEJO-estraro. De maldekstre: Jorg de Mulder, Marion Grosjean, Saskia Idzerda, James Rezendé Piton.

dum la “seriozaj” programeroj dumtagaj.

Tre seriozaj tamen estis la komitat-kunsidoj. Dum sufiĉe longaj sesioj elektiĝis nova estraro (vd. sept., p. 150), akceptiĝis jarraporto, reglamento-ŝanĝoj — kaj la 37-a landa sekcio de TEJO, Serba Esperanto Junulara Orga-

nizo. Post memorprelego de japanaj gejunuloj pri Hiroŝimo la 6-an de aŭg., 87 personoj el 21 landoj subskribis rezolucion kiu “deziras liberigon el [la] timo pri uzo de atombomboj kaj pri kaŭzota katastrofo” kaj alvokas ke ĉiu “premu sian registaron” por pli seriozaj intertraktoj rilate atom-armilojn.

Funkciis diversaj labor- kaj diskut-rondoj: pri Pasporta Servo (kiu poste finfine aperis!), pri homaj rajtoj, naturprotektado, komputilreta Esperantio kaj volontula agado. Pri ĉi lasta TEJO nun havas spertan komision: Francesco Amerio, kiu jam organizas en Italio la 5-an DisSeminaron pri “Internacia volontula laboro” (Possagno, Italio, 7-10 dec.; kontaktu Flavia Dal Zilio, via Cappellotto 11, IT-31100 Treviso; tel. +39/422/23-760.)

Laŭdinda estas la prepara laboro de la rusaj gejunuloj, iliaj efikeco, afa-bleco, eĉ rapideco — kiu ege impresis la spertintojn de la labormaniero eĉ rusaj konsulejoj.

Malkontentaj estos tiuj kiuj atendis profundaĵojn el la juna Esperantio. La junulara E-kulturo restas amasplaĉema — la tiel-nomata pop-kulturo, kiu unuigas nin same kiel nia lingvo.

Bill Mak (Kanado), kun informoj de Sjoerd Bosga (Nederlando)

Relativa sukceso en Ĉinio

La tradicia Komuna Seminario ĝis nun renkontigis gejunulojn el Koreio kaj Japanio. La 14-a KS okazis unuafoje ekster tiuj du landoj: de la 11-a ĝis la 14-a de aŭgusto, ĉe Universitato Nankai en Tianjin, Ĉinio.

Laŭ la oficiala nomaro, la partoprenantaro konsistis el 42 ĉinoj, 35 koreoj kaj 10 japanoj. La koreoj organizis karavanon por ŝipveturi al Ĉinio, dum la japanoj, malpli multaj, alveturis unuope.

En la ĝisnunaj KS-oj, la ĉefa afero estis kutimigi komencantojn al internacia babilado kaj diskuti kun amikoj el la najbara lando. La ĉi-jara KS montriĝis tre malsama. Ni ja multe

ekskursis, manĝis bonege, vespere dancis aŭ “karaokis” (kantis laŭ akompano aŭtomata) — sed mi ne sentis pliigon de esperantumado, kvankam la seminario fariĝis pli ol du-nacia.

Mi petas pardonon de la ĉinaj amikoj pri mia kritiko, ĉar ili ja varmege bonvenigis nin, sed mi sentas neceson honeste raporti pri la malkontento de kelkaj malnovaj KS-anoj. Kial ili malkontentis?

La programo (temo: “Junularo kaj tradicia kulturo”) ne instigis aktivan partoprenon de individuoj, ĉar ni ĉiam pasivis aŭskultante prelegojn kaj salutojn, kaj ne okazis divido en paralelajn, samtempajn programerojn por malpli grandaj grupoj. La noktojn ni pasigis en krokodila medio, ĉar en ĉiu dormoĉambro oni loĝigis samnacionojn.

Mi tamen konscias ke la organizantoj — Ĉina Junulara E-Asocio kaj la junulara sekcio de Tianjin-a E-Asocio, helpe de Ĉina E-Ligo — fervore laboris por bonvenigi nin, kaj la partoprenantoj ja ŝatis ilian regalon. Krome oni devas ne forgesi ke la ĉinoj unuafoje organizis Komunan Seminarion, kaj ili ja relative sukcesis.

Ooŝida Takeŝi (Japanio)

ILEI pri propedeŭtiko

Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj aranĝis sian 29-an Konferencon post la UK. Sed tiu ne estis ĝia sola somera aktivaĵo en la kongreslando.

Por la tri sesioj de la UEA/ILEI-ekzamenoj en Finnlando kandi-
datiĝis sume 28 personoj el 14 landoj,
el kiuj 24 trapasis la ekzamenon (9 je
elementa, 15 je meza nivelo). Kvarono
de ĉi tiuj sukcesis (2 elemente, 4 meze)
en provsio por kandidatoj vidhandi-
kapitaj, dum la Internacia Kongreso
de Blindaj Esperantistoj (IKBE); la
ekzamenoj reokazos en la venontjara
IKBE.

Dumkongresaj aranĝoj

Kunsidon de ILEI partoprenis 71
kongresanoj, inter kiuj la nova UEA-
estraranino pri instruado, Renée Tri-
olle. "Surpodiĝis" lastatempaj instru-
libroj kaj -helpiloj, kaj eldonisto Brun-
netto Casini (Edistudio) prezentis sian

planon eldoni serion de Esperantaj-
nacilingvaj vortaroj.

La Tago de la Lernejo komenciĝis
per prezento de la gastig-landa eduk-
sistemo (Raita Pyhälä) kaj temis pri
"La propedeŭtika valoro de E-o". Cento
da kongresanoj aŭdis de Jennifer Bishop
pri la aŭstralia projekto "Ekparoli",
de Ludmila Medvedeva kaj Irina Gon-
čarova pri instruado propedeŭtika
en Rusio, kaj de Mauro La Torre pri
pedagogiaj terminoj.

La ILEI-konferenco

Por 62 e-istoj el 26 landoj la semajno
post la UK estis tamen kongresa, pro
la 29-a Konferenco de ILEI (Övik, 29
jul. - 4 aŭg.). Kadre de la tema pro-
gramo parolis i.a. Carlo Bourlot, Italio

(projekto Fundapax), Natalija Kasy-
mova, Taĝikio (E-instruado al vid-
handikapitoj), Julián Hernández An-
gulo, Kubo ("Kiel pensigi la lernantojn
Esperante?").

En elektoj du novuloj eniris la es-
traron de ILEI: Brunetto Casini (Italio)
kaj Cseh-instruisto Atilio Orellana
Rojas (Argentino). La ĝisnuna vic-
prezidanto, prof. Ronald Glossop,
fariĝis estrara komisiito. Alia komi-
siito estas Mauro La Torre, pri termi-
nologio. Honora membro de ILEI iĝis
ties prezidinto Edward Symoens. Por
subteni specifajn taskojn de la Ligo,
estis fonditaj pluraj kasoj: konferenca,
ekzamena, eldona kaj ĝenerala.

En la 3-a Gimnazio de ILEI 6 ge-
junuloj el 4 landoj lernis 6 studobjek-
tojn de 6 instruistoj.

Ankaŭ la venontjara, 30-a ILEI-
konferenco tuj sekvos la UK-on: en
Ĉeĥio oni parolos pri "Rimedo por
bona lernado kaj memlernado de E-o".

*Marija Beloŝević
Sekretario de ILEI*

Skoltoj: Ĉu rekomenco?

**Kvazaŭ nova lando aperis sur la mondmapo
por deko da tagoj: 30 000 geskoltoj el 166
landoj tendumis de la 1-a ĝis la 11-a de
aŭgusto en Dronten (Nederlando).**



Inter la 13 subtendaroj de la 18-a Monda Ĵamboreo meze
staris la ĉefaj oficejoj kaj la Monda Vilaĝo pri Evoluo,
kies multspecan programon miloj da skoltoj vizitis ĉiutage.
En tiu vilaĝo la teamo de Skolta Esperanto-Ligo (SEL)
starigis — helpe de la asocio "Esperanto Nederland" — du
informbudojn pri Esperanto kaj SEL, ĉe kiuj daŭre deĵoris
9 SEL-anoj el 4 landoj.

Por prezentadoj ni uzis didaktikan panel-ludon elektran,
kaj ni ankaŭ donis premiojn al tiuj kiuj lernis "pli ol mil
vortojn en malpli ol unu minuto" (fakte, la numeralojn).
Ni disdonis vizitkartojn kun la E-gramatikeroj dorsflanke,
en la angla, franca kaj nederlanda. Ni akceptis 3000 vizi-
tintojn ĉe la budoj kaj notis 180 informpetojn el plej
diversaj landoj. Ofte skoltestroj deziris informi sian grupon
pri Esperanto. Vendiĝis 43 ekzempleroj de la E-lernolibreto
de SEL, *Ĵamborea lingvo*. Unu aĉetinto poste venis ĉiutage
kaj progresis tiel rapide ke li kapablis paroli dum Es-
peranta vesper-kunveno!

Ni eksciis pri la ĉeesto de ĉ. 50 Esperanto-skoltoj el 15
landoj. Pluraj el ili ne konis SEL, kaj 34-jara skoltestro el
Kazaĥio eĉ opiniis ke Esperanto ne plu ekzistas.

Amikeco kaj egaleco regis en tiu travivinda ĵamboreo,
kiu estus eĉ pli mirinda sen la problemo de komunikado,
kiun la du oficialaj ĵamboreaj lingvoj, la angla kaj la franca,
ne solvis entute. Ĉu la informa artikolo kies aperon oni
promesis al ni en la revuo de Monda Skolta Organizo,
estos nova komenco en tiu medio de milionoj da gejunuloj?

*Arie kaj Marlène Bouman (Belgio),
Emmanuel Djikoune (Senegalio)*

**Martin Bähr, aŭstra E-skolto,
ĉarpentas en alto nekutima por Nederlando.**

Brila kongreso, sed pliaĝiĝo

Kongresinte en Hungario jam en 1962 kaj 1982, Internacia Fervojista E-Federacio (IFEF) trian fojon invitis al tiu lando.

Sub la devizo “Per medioamika fervojo kaj komuna lingvo al la 21-a jarcento”, 327 esperantistaj fervojistoj el 23 landoj ariĝis inter la 20-a kaj 26-a de majo por la 47-a IFEF-kongreso en Pécs.

En la inaŭguro la ĝenerala direktoro de la Hungaraj Ŝtatfervojoj, Zoltán Rigó, alparolis la kongresanojn en Esperanto, kaj promesis lerni la lingvon. Esperanton uzis ankaŭ Gilbert Schmit, prezidanto de la pli ol 100-mil-membra FISAIC (Internacia Federacio de Artaj kaj Intelektaj Asocioj de Fervojistoj). Hungarlingve salutis i.a. la urbestro de Pécs, Zsolt Páva, kiu en posta tago akceptis la estraron kaj komitaton de IFEF kaj la lokajn organizantojn. (La LKK-n estris la vicprezidanto de IFEF, István Gulyás.)

La ĉefprelego pritraktis la evoluon de la hungara trafiko ĝis 1996 (József Halász); kromaj sep fakaj prelegoj temis pri aŭtomataj biletsistemoj, planoj pri energi-ŝparo en Germanio, emblemoj de fervoj-administracioj ktp.

En la kunsidoj de la Faka Komisiono oni konstatis ke ekstreme malfacilas liveri antaŭ la severaj limdatoj

la E-kontribuojn al la 11-lingva codo-roma* terminaro de Internacia Fervoj-Unio, kun kiu IFEF kunlaboras; malgraŭ tio — diras la komisiona raporto — necesas “plenumi ĉiujn taskojn ĝis tiu limdato kiun havas aliaj lingvoj”, por eviti perdon de prestiĝo. Antaŭ la Kongreso aperis la 4-a numero de *Fervojfakaj Kajeroj*, parte el la faka programo de la antaŭa IFEF-Kongreso.

Krom E. Henning Olsen (Danio), reelektiĝis la kvinkapa estraro, sed trianoj esprimis firman intencan retiriĝi post tri pluaj jaroj. Olsen, kiu post 13 jaroj transdonis la redaktadon de la IFEF-bulteno (*Internacia Fervojisto*) al sia samlandano Erna Hauge, estis nomumita Honora Membro.

Unuan fojon okazis ke IFEF-kongreson ĉeestis pli da homoj el eks-socialismaj landoj ol el okcident-eŭropaj. Tio “ne montras kreskon de pagipoveco ĉe tiuj unuaj, sed pliaĝiĝon kiu malebligas

al tiuj duaj veni al kongresoj” — komentas *Internacia Fervojisto* (kiu cetere epitetas la kongreson “brila”). Efektive, en 1994 mortis 47 el la 1800 IFEF-membroj, kaj malpliigis la UEA-fakdelegitoj pri fervojoj (de 59 al 56). Malfondiĝis la landa asocio en Finnlando, dubindas la situacio en Britio kaj Estonio (kiu aliĝis al IFEF en 1992) — evoluoj kiuj zorgigas IFEF. Aliflanke, en Svedio oni klopodas starigi novan asocion.

Estis jam konate ke la venontjaraj kongresoj okazos en Hago (11-18 majo 1996) resp. Košice (Slovakio, 1997); al ĉi tiuj nun aldoniĝis Århus (Danio) por 1998.

Laŭ diversaj raportoj

*codoromo = komputila disko kun nemodifbla registraĵo (*Komputila leksikono, Comprehensive English-Esperanto Dictionary*)



Foto: Karen Olsen

La tradicia prezento de diverslandaj uniformoj ne povis manki el la programo.

Kongreso kun kardinalo

La 48-an Kongreson de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (8-15 julio, Olomouc, Ĉeĥio) honoris per sia ĉeesto kardinalo Miloslav Vlk, kiu akceptis fariĝi Honora Patrono de IKUE.

La ĉeĥa primaso, ĉefepiskopo de Prago, estis la ĉefa celebranto de unu el la mesoj dum la kongreso. En sia E-lingva homilio li menciis siajn studentajn jarojn en České Budějovice, kiam li lernis Esperanton. Laŭ li, Esperanto estas same supernacia kiel la eklezio. Li pasigis posttagmezon kun la kongresanoj, diskutis kaj vespermanĝis kun ili. De la ĝisnuna prezidinto de IKUE, Duilio Magnani, li ricevis la Esperantan meslibron oficiale aprobitan de la ekleziaj instancoj, kiu estas fine disponebla.

(Cetere, nur kelkajn tagojn pli frue

la ĉefepiskopo faris tre rimarkitan alparolon, en ekumenisma spirito, dum komuna diservo de pluraj eklezioj en Prago, je la 580-a datreveno de la brul-ekzekuto de la reformisto Jan Hus.)

Alian meson, en Esperanto, kuncelebris ĉiuj ĉeestantaj 14 pastroj, i.a. monsinjoro Jan Graubner, ĉefepiskopo de Olomouc, kaj lia helpepiskopo, mons. Jozef Hrdlička.

Kongresis 177 homoj el 13 landoj, el kiuj ĉ. 150 el Orienta Eŭropo; entute mankis gejunuloj okcidentaj. Tamen, ekestis intenco fondi venontjare junu-

laran sekcion de IKUE, al kiuj jam surloke aliĝis kelkaj. (Organizas: Anna Němcová, Zvolenská 5, SK-010 08 Žilina, Slovakio; retpoŝto: nemec@fstroj.utc.sk.)

Lige al la temo “La eklezio, popolo de Dio, renkonten al la tria jarmilo” prelegis i.a. Lajos Kóbor, pri la dua vatikana koncilio; Jan Kalný, pri la rolo de la katolika E-movado sojle de la nova jarmilo; Jiří Laube pri ekumenismo; kaj József Zielonka pri feliĉo.

Elektiĝis nova estraro de IKUE: d-ro Antonio de Salvo (prezidanto), Lajos Kóbor, Miloslav Šváček (viceprezidantoj), Serio Boschín, Hatto von Hatzfeld, Jan Kalný, Duilio Magnani, Carlo Sarandrea kaj Magda Šaturová. Magnani, kiu prezidis IKUE dum 16 jaroj, iĝis honora prezidanto.

Laŭ Katolika Sento, KEC-Bulteno, La Dua Jarcento, E-isto Slovaka, J. Mařík

Kongresu centre de la mezo


Dek kvinjara paŭzo sekvis post la kongresoj en 1978 (Marília, Brazilo) kaj 1980 (San Luis, Argentino) ĝis nun, kiam kostarikanoj fine organizas Trian Amerikan Kongreson.

La Universitato de Kostariko, en la ĉefurbo San José, gastigos la kontinentan kongreson de la 12-a ĝis la 17-a de februaro 1996, kun la ĉeftemo "Esperanto kaj la rilatoj Nordo-Sudo en Ameriko".

Kostariko, senarme lando, estas ĝusta loko por kongresi, ĉar ĝi formas vojkruciĝon inter Suda kaj Norda Amerikoj. Ĝi situas en la centro de la mez-amerika istmo, inter du oceanoj. El ĝia kompleksa geografia fontas diversaj klimataj kondiĉoj kaj la ekzisto de vivzonoj tiel malsimilaj kiel seka tropika arbaro kaj la ebenaĵo *paramo*.

Kostariko praktikas naturprotektan politikon: 21% de la teritorio estas protektata pro sia ekologia aparteco. La sola oficiala lingvo estas la hispana, tamen ekzistas komunumoj de enmigrintoj kiuj parolas angle, itale kaj kanton-ĉine. La indiĝenoj konservas siajn lingvojn kaj kulturojn.

La E-movado aperis en Kostariko ĉirkaŭ 1905, kiam oni publikigis la



La antaŭ-kolumbaj ceramikaĵoj de Kostariko elstaras en la amerika arthistorio.

revuon *Esperanta Skarabaro*. Tamen, malgraŭ la senkondiĉa apogo de la fama klerulo Carlos Gagini (1865-1925), Esperanto ne atingis la grandan publikon. Sed nuntempe Esperanto disvolviĝas, ĉefe en akademiaj medioj, kie daŭre kreskas la intereso pri interlingvistiko. Ĉe Universitato de Kostariko ĉiujare okazas oficiala dusemajna kurso pri Esperanto.

Ne estas do strange ke la Tria Amerika Kongreso ricevas apogon de tiu universitato. Krome, la ambasadoj de Pollando kaj Honduraso montris intereson pri la aranĝo, same kiel la ministerio pri junularo, sporto kaj kulturo.

Ni atendas almenaŭ 70 partoprenantojn el 20 landoj. Krom la kunsidoj pri amerika agado okazos i.a. Cseh-seminario "A" de Atilio Orellana Rojas, UEA/ILEI-ekzamenoj, prelegoj, E-ekspozicio kaj diversaj ekskursoj. Aparta programo enhavos viziton al naciaj parkoj kaj al la Kariba marbordo — "la alia Kostariko", tiu kiu ne parolas hispane...

Juna kaj vigla movado atendas vin en Kostariko!

Jorge Antonio Leoni de León

LKK-estro

Apartado 7603-1000

San José, Kostariko

Tel. +506/231-41-67

Brazilo: Federacia tendenco

Instruisto pri gimnastiko kaj filozofio, José Adriano Carneiro, biciklis el la urbo Salvador 1540 km-ojn en 11 tagoj al la 31-a Brazila Kongreso de Esperanto.

La aliaj 474 partoprenantoj, el 21 brazilaj ŝtatoj, elektis malpli tempopostulajn veturilojn por alveni al la kongreso en Juiz de Fora (9-14 julio).

Ĉi tie adiaŭis estraro (1992-95) kiu povis raporti pri la plenumo de ĉiuj siaj "elektopromesoj": BEL kreis reton de reprezentantoj kaj informservon, pliampleksigis sian korespondan kurson, kaj pligrandigis la sidejon per aĉeto de alia ĉambro. La BEL-membraro de post 1993 kreskis je pli ol

30%. BEL faris paŝojn por reeldoni la dudirektan E-portugalan vortaron de Carlos Domingues (1978), kun suplemento de Sylla Chaves.

Tamen, pri tiu reeldono BEL fine devas portempe rezigni, pro la kosto de sia organo *Brazilia Esperantisto*, kiu reaperis post sesjara paŭzo. La laŭplane trimonatan, 24-paĝan revuon redaktas Symilde kaj Gilbert Ledon.


Symilde Ledon, ĵus eksa ĉefdelegito de UEA, ricevis ankaŭ alian taskon:

ŝi elektiĝis kiel nova prezidanto de BEL. En la estraro ŝin akompanas ŝia antaŭulo Francisco Mattos de Oliveira (vicprezidanto), Carlos Maria, Leda Gama, Humberto Lopes (sekretarioj), Aymoré Vaz Pinto kaj Maria das Dores (kasistoj). La kerno de la estraro konsistas el veteranoj deĵorantaj en la BEL-oficejo en Braziljo.

Laŭ komento de *Brazilia Heroldo*, la kongreso "konfirmis la tendencon naskiĝintan okaze de la januara kunsido de la Federacia Konsilantaro de BEL" (vd. apr., p. 65), tendencon al "la kunplektiĝo de ĉiuj internaj fortoj de la brazila movado" en nova, federacia strukturo.

Laŭ *Brazilia Esperantisto*, *Brazilia Heroldo*, *Esperantopres*

Recenzoj



Ĉu ĝi "rompis la rekordon"?

Comprehensive English-Esperanto Dictionary. Peter J. Benson. El Cerrito: ELNA, 1995. 607p. 22cm. Broŝ. 39,00 gld.; bind. 48,00 gld.

Mi sisteme komparis 18 hazarde elektitajn paĝojn el ĉi tiu nova vortaro kun la respondaj partoj en la konata vortaro de John Wells. Jenaj citaĵoj bone ilustras la ĉefajn diferencojn; la unua estas el Wells (1969), kaj la dua el Benson (1995):

record registr-i, -o; (gramofon)disko; surbendigi; kroniko, raporto, protokolo; (*unexcelled performance*) rekord-o, -a; (*criminal*) (justica) registronoto; **r.-player** diskoturnilo, *elektrofono

record, (put in writing, register, gen), registri [tr]; ~iĝi; ~o; (chronicle), kroniki [tr]; (show, as on instrument dial), montri [tr]; (phonograph), (gramofon)disko; (sound or video onto tape), ~i, surbendigi; (greatest amount achieved), rekordo; rekorda (e.g.: *a record high temperature*: rekorda maksimuma temperaturo; *break, tie the record*: rompi, egali la rekordon); [...] **records**, (archive), arkivo; **record player**, gramofono; [...] **off the record**, malpublika, konfidenca; malpublike, konfidence; **on the record**, publika, oficiala;

publike, oficiale; **go on record**, oficiale [or] publike deklari [tr]

1. Wells havas partojn Esperanta-anglan kaj angla-Esperantan, dum Benson estas nur angla-Esperanta.

2. La angla-Esperanta parto de Wells havas ĉirkaŭ 20 000 vortojn. Benson havas aldone ĉirkaŭ 8 000, kiujn Wells ne havas; ili estas precipe nomoj de homoj, lokoj, plantoj kaj animaloj (kiuj aperas kaj sub siaj anglaj kaj sub siaj latinaj taksonomiaj nomoj).

3. Por la anglaj vortoj kiujn ambaŭ havas, Benson apenaŭ donas pli da tradukoj. Benson ŝajnas esti vere sendependa de Wells, ĉar ĝi ofte proponas tute malsaman aron da tradukoj por la sama vorto. Tamen ofte la tradukoj en Wells ŝajnas pli bonaj. Por beletra tradukado neniu estas evidente pli bona ol la alia, sed estas iom utile disponi pri ambaŭ.

4. Mi trovas malkonvena la subordigon de parencaj vortoj en la sama artikolo en Benson; oni devas ekzemple serĉi *operetta* sub *opera*, *turncoat* sub *coat*, *incapacitate* sub *capacity*;

sow /sau/ "porkino" kaŝas sin en la mezo de la artikolo pri *sow* /səu/ "semi".

5. Wells nur escepte donas sencdistingajn indikojn; Benson donas ilin sisteme, sed bedaŭrinde ili estas presitaj samstile kiel la tradukoj, kio malfaciligas rapidan trarigardon. Por uzanto kiu bone scias la cellingvon, sencdistingiloj povas esti pli ĝenaj ol helpaj, se ne eblas facile pretervidi ilin.

6. La grafika aranĝo de Benson estas ĝenerale nekontentiga. Al mi ne plaĉas la uzado de ondostrekoj (~) por anstataŭigi la radikojn de la unua traduko en la artikolo; dum uzado oni havas en sia kapo la fontlingvan kapvorton, ne la unuan tradukon, do la ondostrekoj ne estas facile interpreteblaj se oni rapide trarigardas artikolon. Kial oni uzis kursivojn (nur) por la ekzemploj?

7. Benson havas multe pli da ekzemploj ol Wells, sed ofte ili estas laŭvorte aŭ maltrafe tradukitaj. La traduko *rompi la rekordon* en la citita artikolo estas almenaŭ atestita, sed mi ne vidas la valoron en tradukoj kiaj *dolorigies sentojn* por *hurt one's feelings*.

8. Wells estas brita, dum Benson estas usona, kio klarigas kelkajn lingvajn diferencojn inter ili. (Tamen neniu indikas prononcadon, kie kuŝas la ĉefa diferenco inter la du lingvospecoj.)

Por ilustrati miajn kritikojn pri la grafika aranĝo de Benson, mi aldonas similampleksan artikolon, kiun mi mem verkis imitante la stilon de iu neesperanta vortaro. Komparu kaj juĝu mem:

record [rɪ'kɔ:d] 1 *vt* (a) *facts, events* (*person*) registri; (*documents, diary, etc*) kroniki, atesti; (*keep minutes of*) protokoli. (b) (*meter, etc*) montri. (c) (*onto tape*) surbendigi, registri. 2 ['rekɔ:d] *n* (a) (*account*) registro; (*of meeting*) protokolo, raporto; (*official document*) akto, dokumento; (*chronicle*) kroniko. ~s arkivo; **off the ~** konfidence, malpublike. (b) (*criminal ~*) (justica) registronoto. (c) (*of person*) atestoj, (viv)protokolo. (d) (*Mus*) (gramofon)disko. ~-**player** gramofono, diskoturnilo. (e) (*sth unexcelled*) rekordo. **break a ~** rompi or superi rekordon. 3 *adj* (*unexcelled*) rekorda. a ~ *temperature* rekorda temperaturo.

Edmund Grimley Evans (Britio)

Alain Fournier

La granda Meaulnes

Fama priskribo de pura amo.
La sola verko de la aŭtoro,
kiu mortis nur 27-jara.

El la franca trad. Roger Bernard. Rotterdam/La Laguna: UEA/J. Régulo, 1988/1975 (eldono/preso). 222p. 21cm. Belliteratura serio 32. Prezo: 22,50 gld.



Estas tempo rekotizi por 1996!

Frua pago certigas la kontinuecon en la ricevado de ĉi tiu revuo. Krome, ĝi helpas la laboron de la Centra Oficejo kaj ŝparas monon al UEA. Antaŭdankon!

Amplekso povas trompi

Grand Dictionnaire Français-Espéranto. Jacques Le Puil, Jean-Pierre Danvy k.a. Paris: France-Espéranto, 1992. 939p. 20cm. 93,00 gld.

Apero de granda vortaro dulingva de granda lingvo, kiel la franca, ĉiam estas grava afero en Esperantujo! En 1992 eldoniĝis tia vortaro en Parizo, dika volumo pli ol 900-paĝa, verkita de la duopo Jacques Le Puil kaj Jean-Pierre Danvy, esperantistoj konataj ne nur en Francio. Mi aparte alte taksas la unuan, J. Le Puil, kiun mi kelkfoje admiris pro la vervo kun kiu li ĵonglas per la lingvo. Krome aperas pliaj digne sonantaj nomoj: Georges Lagrange, André Cherpillod

Ĉu formoj kiel *martrinki* (p. 112, “boire un bouillon [en nageant]”) kaj *planverki* (p. 643, “tracer un plan”) estas tiel rekomendindaj ke tiaj kunmetaĵoj (akuzativa komplemento *sen* la akuzativa finaĵo *-n* + infinitivo) eniru grandan vortaron? Absolute ne, eĉ se ekzistas kelkaj (ankaŭ de Zamenhof uzitaj) similaj formoj, kiuj intertempe akceptiĝis fare de la uzantoj de Esperanto, ekz. *bondeziri* (= deziri bonon). Leksikografoj estu pli singardaj! Same pri serpente longaj



Le Puil (maldekstre, angule) kaj Danvy (aŭtografas) jam laboras pri la daŭra reviziado de la granda vortaro franca-Esperanta.

kaj Jean-Louis Texier, kiuj respondecis pri la korektado. Aparte Cherpillod estas, sendube, elstara lingvoscianto, kiu multege publikigis (i.a. la alte ŝatatajn kaj uzatajn *Nepivaj vortoj* kaj *Mil ekzotaj vortoj*). Do, estis la atendoj pli altaj...

Longe mi sidis kaj trafoliumadis la dikan libron, horojn, tagojn. Kelkfoje mi mire-aprobe aplaudis neologisman kunmetaĵon, aliafoje mi silente-kapskue indigniĝis pro tro multaj francismoj. Ampleksa vortaro vere, sed la amplekso ja povas ankaŭ trompi! La juĝo: nepre reviziu la verkon por iu dua eldono kaj elsarku vortojn aŭ kunmetaĵojn tro riskajn aŭ tute ne kompreneblajn (ekster Francio).

Ĉu vi, kara leganto (nefranco), povas kompreni ekzemple *ĉe-grunda homo* (p. 845, “un homme de terrain”), *kolinsko* (p. 498, “kolinski”), *kuglofo* (p. 498, “kouglof”) aŭ *slovo* (p. 792, “slow”)? Evidente por la lasta pli taŭgas *slofokso* (laŭ la angla “slow-fox”), kiu troviĝas jam en multaj Esperanto-vortaroj dulingvaj.

kunmetaĵoj: ekz. ne tre konvenas *kapalvostoturniĝo* (p. 847, “tête-à-queue”) kaj *velpintoplifortikaĵo* (p. 847, “têteière”).

Tamen, la vortaro kompreneble havas ankaŭ multajn bonajn flankojn. Ĝi ekzemple proponas trafajn tradukojn aŭ kreaĵojn por proverboj, parolturnoj kaj idiomaĵoj. Ni menciui: *paŭti* (p. 515, “faire la lippe”), *esti superekscitita* aŭ *esti en plena ekscitiĝo* (p. 574, “être à bout de nerfs”), *estas ĉiam la popolo, kiupagas* (p. 629, “c’est toujours le petit qui trinque”) k.m.a.

Por iu venonta — plilarĝigota kaj severe kontrolenda — eldono, oni ĉerpu el la Bildvortaro de Eichholz kaj el la nove aperintaj dulingvaj Esperanto-vortaroj, el kiuj kelkaj estas treege bonaj (de Ĉinio tra Japanio ĝis Svedio). Leksikografo ne estas sole kompilado, sed senfina komparado kaj senĉesa trakribado de alilandaj E-vortaroj kaj, ĉefe, de la tuta gamo de modernaj publikigaĵoj esperantlingvaj.

Erich-Dieter Krause (Germanio)

Post longa gravedo

Dictionar esperanto-român. I. F. Bociort, A. Brutiș k.a. Timișoara: Eurobit, 1995. 276p. 27cm. 18,00 gld.

Inter la E-eldonaĵoj por rumanlingvanoj aperintaj post la t.n. “revolucio”, ĉi tiu “Vortaro Esperanto-rumana” (VER) estas sendube la plej rimarkinda: pro sia utilo (tian verkon rumanlingvaj esperantistoj sopiras jam jardekojn), sed ankaŭ pro sia aspekto (almenaŭ kompare kun aliaj esperantaĵoj eldonitaj en Rumanio).

VER estas preter ajna dubo la plej riĉa E-rumana vortaro, kaj la plej facile utiligebla. Samtempe ĝi estas la plej multekosta e-aĵo eldonita en Rumanio, sed la mencio ke ĝi enhavas preskaŭ 8500 kapvortojn helpas pli facile elpoŝigi kelktagan salajron por la 276-paĝa verko.


La vortaro aperis post longa gravedo, dum kiu la bebo preskaŭ suferis abort(ig)on, kaj la provoj murdi ĝin ne restis senefikaj. Mankas en VER, ekzemple, propraj nomoj kaj — grave — la ĉefaj gramatikeroj, kiuj helpu eĉ la plej freŝan komencanton uzi la vortaron. Kompense, kaj apenaŭ utile, 10 paĝojn okupas antaŭparolo konsistanta el “Mallonga historio” de la vortaro (ne nepre utila, sed ne sen-interesa), “Konsiloj pri la uzado de la vortaro” (mankas utilaj konsiloj, sed abundas klarigoj /ekskuzoj?/ pri la kreado de la vortaro), kaj eseo “Kial Esperanto estas necesa?”, neniel senvalora, sed dubinde utila kiel enkonduko al E-vortaro.

Alia grava manko estas nemencio de kriterioj por la elekto de la radikoj kaj derivaĵoj envortarigitaj, tiel ke ne klariĝas la eventuala (mal)manko de iu aŭ alia radikoj. Anstataŭ la librofina listo de verkoj (supozeble) uzitaj de la kompilintoj (apenaŭ pageblaj por rumaniaj esperantistoj), pli utilis listo de tiuj Esperantaj lernolibroj aperintaj en Rumanio kiuj enhavas ankaŭ vortaron.

Spite siajn malperfektaĵojn (kio estas perfekta?) VER restos dum longa tempo referencverko en la rumania Esperanta bibliografio, kaj pro tio ĝiaj aŭtoroj meritas sincerajn laŭdojn. Ĉu ni povas esperi ke baldaŭ al ĝi aldoniĝos ankaŭ VRE?

Ionel Oneț (Rumanio/Usono)

Laste aperis



Aboco de tempoplanado, La. Lothar J. Seiwert. Kunlaboris Winfried U. Graichen. El la germana trad. E-grupo Stuttgart. Roterdamo: UEA, 1995. 53p. 20cm. Konsilaroj por Aktivuloj, n-ro 2. Kiel plej efike utiligi sian tempon. En 12 lecionoj. 7,50 gld.

Asteriks kaj Kleopatra (1965). Goscinny. Desegnis Uderzo. Esperantigis Nedeljko Korasić. Zagreb: Izvori, 1995. 48p. ISBN 953-6157-20-9. 29cm. Nova bildrakonta aventuro de la nevenkeblaj gaŭloj. 16,80 gld.

Bibliografio de disertacioj pri Esperanto kaj interlingvistiko — Suplemento. Komp. Edward Symoens. Rotterdam: UEA/CED, 1995. 63p. ISBN 92 9017 049 2. 21cm. Detale priskribas centon da verkoj novaj aŭ mankintaj en la unua eldono (1989). 7,20 gld.

Comprehensive English-Esperanto dictionary. Peter Benson (1940). El Cerrito: ELNA, 1995. 607p. ISBN 0-939785-03-X. 22cm. Bind. La plej ampleksa kaj ĝisdata vortaro angla-Esperanta, kun ĉ. 28 000 kapvortoj. 48,00 gld. (Vd. recenzon, p. 172.)

Ĉeĥa-esperanta jura vortaro. Karel Traxler. Praha: Ĉeĥa E-Asocio, 1986. 137p. 21cm. Ĉ. 10 000 kapvortoj, multaj esprimoj kaj frazoj. 18,00 gld.

Ĉu leŭcito en Bohemio? Josef Kavka (1922). Dobřichovice: KAVA-PECH, 1995. 31p. ISBN 80-85853-09-4. 19cm. Geologia studo pri la konsisto de nord-bohemiaj vulkanaĵoj. 3,90 gld.

Etimologia vortaro de Esperanto. Volumo 4: N-R. Ebbe Vilborg (1926). Malmö: Eldona Societo E-o, 1995. 124p. ISBN 91-85288-22-5. 24cm. Daŭrigo de tre klera kaj profunda prezento de la origino de la Esperantaj radikoj. 33,00 gld.

Gunkela vortaro. Claus J. Günkel (1963). Paderborn: Eŭropa Klubo, 1994 (2-a eld.). 44p. 21cm. Kelkcento da kapvortoj post-PIVe registritaj aŭ nove proponataj, kaj da propraj nomoj. 4,80 gld.

Humuro laŭ la skota maniero. Andrzej kaj Remigiusz Pettyn. Enkonduko de William Auld. Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo, 1995. 84p. ISBN 90-71205-60-6. 21cm.

Ilus. 257 ŝercoj pri la onidire avaraj skotoj. 15,00 gld.

Interhelpe, kiel faktoro de l' evoluo (1902). Pjotr Kropotkin (1842-1921). Trad. Jacqueline Lépeix, Valo. Moskvo: Impeto/Liberecana frakcio de SAT, 1995. 280p. ISBN 5-7161-0011-2. 20cm. Fundamenta verko de anarkiismo. 21,00 gld.

Intimaj portretoj. Juan Lázaro Besada Toledo (1953). Havano: Abril, 1994. 38p. ISBN 959-210-090-X. 21cm. Ilus. Dek malgrandaj prozaĵoj meditemaj. 5,40 gld.



Ĉu Asteriks kaj Kajto, ĉi tiuj konstantaj rolantoj de furorlistoj, ankoraŭ bezonas reklamon?

Jutellaan! Esperanton keskustelukurssi vasta-alkajille. Andrzej Pettyn (1938). Hyvinkää: Mendoservo, 1995. 57p. ISBN 952-9602-06-5. 21cm. Elementa lernolibro por finnlingvanoj. 9,90 gld.

Kajto-kanonoj. Kajto. Drachten: Flugdrako, 1995. 6p. 30cm. Tekstoj kaj muziknotoj de 18 kanonoj. 9,90 gld.

Kajto – kantlibro. Komp. Nanne Kalma. Drachten: Flugdrako, 1995. 72p. 30cm. La tekstoj kaj muziknotoj de ĉiuj kantoj sur la ĝisnunaj diskoj de Kajto. 30,00 gld.

Kantoj de Mikaelo Bronštejn (1949). Moskvo: Impeto, 1995. 32p. ISBN 5-7161-0012-0. 30cm. 21 kantoj verkitaj en la medio de la sovetia E-movado (1973-1990). Kun muziknotoj. 8,10 gld.

Kiel kreiĝis la internacia lingvo. Jak powstał międzynarodowy język Esperanto. Halina Baranowicz. 1995. 36p. 21cm. Dulingva: E-pola. Vivrakonto de Zamenhof. 4,50 gld.

Kongresaj paroladoj. L.L. Zamenhof. Jekaterinburg: Ruslanda E-isto, 1995. 64p. 20cm. 7 paroladoj ĉe Universalaj Kongresoj kaj 4 aliaj. 6,00 gld.

Konversaciilo rusa-esperanta-angla-germana. (Anatolo Ŝejpak – Galina Stanešnikova.) Moskva: Ruthenia-Masi, 1995. 30p. 21cm. 318 esprimoj. 3,90 gld.

Kritika komentario al kelkaj vortoj en Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Olav Reiersøl (1908). Natterøy: la aŭtoro, 1995. 24p. 30cm. 9,00 gld.

KIO PLEJ VENDIĜIS EN TAMPEREO?

Titolo	Vendoj Prezo (gld.)	
1. Kalevala	*259	22,00
2. Muminvalo (T. Jansson)	149	18,00
3. Asteriks kaj Kleopatra (bildstrio de Goscinny-Uderzo)	80	16,80
4. Suomi-esperanto-suomi (J. Vilkkilä, H. Favén, poŝvortaro)	55	15,00
5. Etimologia vortaro de E-o: N-R (E. Vilborg)	44	33,00
6. Humuro laŭ la skota maniero (A. Pettyn)	36	15,00
7. Asteriks, la gladiatoro (bildstrio de Goscinny-Uderzo)	35	16,80
8. Mazi en Gondolando (E-instrua kompleto kun vidbendo)	31	189,00
9. Esperantaj sinonimoj (J. Ojalo)	30	15,00
10. La rondo familia (sociologiaj esploroj, N. Rašić)	29	27,00
11. Ŝtupo post ŝtupo (konsilaro de J. Baksa)	29	7,20
12. Zamenhof malpravis en kvietata mateno (historioj pri la Seula UK)	26	10,20
13. Mil unuaj vortoj en Esperanto (H. Amery)	25	31,50
14. Anne Frank ne estas de hieraŭ (M. Bouhuys)	*20	15,00
15. Komputika leksikono (S. Pokrovskij)	20	36,00
16. Nesto de viperoj (I. Nemere)	20	18,00
17. Originala Esperanta bildvortaro (S. Chaves)	20	16,50
18. Samarkand' (kasedo de Ĵomart kaj Nataŝa)	20	27,00
19. Tohuvabohuo (kompakta disko de Kajto)	20	25,80
20. La nigra insulo (bildstrio de Hergé)	19	18,90
21. Vinilkosmo-kompil' I (kompakta disko)	19	39,00

*venditaj rabate

Mi memoras Hiroŝimon. Stephen Kelen (1912). El la angla trad. Ralph Harry. Matraville: Aŭstralia E-Asocio, 1995. 78p. ISBN 0 646 242180. 21cm. Hiroŝimaj spertoj de aŭstralia ĵurnalisto en la jaroj post la atom-bombo. Kun ĉiupaĝaj fotoj. 9,90 gld.

Nomoj de acidoj en internacia lingvo ILo. Jan Waclaw Pióro (1926). Piastów: la aŭtoro, 1996 (2-a eld.). 28p. ISBN 83904162-1-2. 21cm. 8,40 gld.

Parolturnaro germana-Esperanto. Hans kaj Kerstin Wiersch. Leuven: Esperanto

ĉeĥa suvereno kaj rom-germana imperiestro (1316-1378). 12,00 gld.

Saidja kaj Adinda (1860). Multatuli (1820-1887). El la nederlanda trad. Johan van der Hoek. Heerhugowaard: la tradukinto, 1993. 35p. 21cm. Ilus. Rakonto el *Max Havelaar*, klasika romano pri kolonia ekspluatado. 5,10 gld.

Sankta Kazimiro (1458-1484). Pranas Gavénas. El la portugala trad. Cleber Lemos, Leopoldo Knoedt. Kaunas, 1995 (2-a eld.). 95p. 17cm. Biografio de "la unua laika juna sanktulo de la moderna epoko". 4,80 gld.

Sonosteno. Joseph Gamble (1920). Pisa: Edistudio, 1995. 110p. ISBN 88-7036-060-1. 24cm. Bind. Prezento de "tre rapida, presebla, ĝenerala" stenografio por multaj lingvoj. 24,00 gld.

Sukcesa mamnutrado. Anna Löwenstein (1951). Roma: Associazione per l'Allattamento Materno, 1995. 26p. 30cm. Konsilioj por ĵusnaskintaj patrinoj. 9,90 gld.

Survoje al universala civilizacio. Giordano Moya Escayola (1913). Barcelona: Barcelona E-Centro, 1995. 205p. ISBN 84-605-3105-8. 21cm. Analizo de la homara evoluo kaj de la nuntempa civilizacia krizo. 16,50 gld.

Ŝtonamaso (1880). Ivan Vazov (1850-1921). El la bulgara trad. Canko Ignev. Sofio: Fondaĵo Socio kaj Esperanto, 1995. 52p. ISBN 954-90063-1-X. 21cm. Poemo pri-skribanta "moralan linĉon" per kiu bulgaraj vilaĝanoj punis siajn samnaciojn kiuj helpis la turkajn okupantojn. Kun bibliografio de la verkoj de Vazov tradukitaj en E-on. 5,70 gld.

Ŝtupo post ŝtupo (Laŭpaŝa prosperado). József Baksa (1958). Zalaegerszeg: Prospera Linio-Unuiĝo, 1995. 160p. 15cm. Praktika konsilaro por "prosperigi Esperanton kaj [tiujn] kiuj uzas ĝin". 7,20 gld.

Zamenhof malpravus en kvietata mateno. Rakontoj pri la 79a Universala Kongreso en Seulo. Red. Choe Taesok. Seulo: Korea E-Asocio, 1995. 91p. 21cm. Ĉio kion oni ne povis legi en la oficialaj raportoj. 10,20 gld.

Zoologia kaj botanika nomenklaturaj (Propono pri regularoj). Terminografia Komisiono pri botaniko kaj zoologio sub gvido de Carl Stöp-Bowitz. Rotterdam: UEA/TEC, 1994. 15p. 21cm. 4,80 gld.

DIVERSAĴOJ


Kasedo: Vulkano. Solo (Eduardo Vargas Gutiérrez). La aŭtoro, 1994. 18 kantoj laŭ tekstoj el *Ibere libere*, poemaro de Gonçalo Neves, Georgo Kamaço, Liven Dek kaj Miguel Fernández. La aŭtoro-kantisto ludas pli ol 20 instrumentojn. 30,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA. Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldona valoro imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Foli- ume




Nova Zamenhof-biografio



La konata Parisa eldonejo Ramsay (103 boulevard Murat, FR-75016 Paris) publikigis la 5-an de septembro ĉi-jare francalingvan biografion de d-ro L. L. Zamenhof, la patro de Esperanto. La 408-

paĝa *L'homme qui a défié Babel* ("La homo kiu defias Babelon") estas verkita de René Centassi, eksa ĉefredaktoro de la franca novaj-agentejo AFP, kaj de Henri Masson, konata SAT-aktivulo kaj informaganto. La libro celas ĝeneralan publikon, kaj la eldonisto intencas aperi ĝin en aliaj lingvoj. (H. Masson)



Esperanto kuplita al Wired

Wired (= "alkuplita") estas usona monata revuo de pli ol 200 paĝoj pri amas-komunikado kaj komputiloj, kies slogano sonas: "Get wired!" (= "Alkupliĝu!"). Ĝuste ĉi lastan Esperantan vorton malkovris la CO-oficisto Francjo Veuthey sur la kovrilpaĝo de la junia *Wired*. Pri la ekesto de la neatendita esperantaĵo venis klarigo de alia E-oficisto, Miko Sloper el la Centra Oficejo de la usona asocio ELNA: *Wired* aperigas tradukojn de sia slogano ĉiumonate en alia "ekzota" lingvo: sanskrita, finna ... Do, la Esperanta kuplileto de *Wired* daŭris nur unu monaton. Tamen, esperantistoj profitis: la ELNA-oficistoj ricevis 25 dolarojn por la traduko de tiu sola vorto.



2000/Flandra E-Ligo, 1995. 414p. ISBN 90-71205-59-2. 21cm. Internacie kompreneblaj tradukoj de 20 000 germanaj frazoj, frazerioj, sintagmoj, dirmanieroj, idiotismoj kaj proverboj. 42,00 gld.

Pasporta Servo. La listo de gastigantoj de TEJO. 1995. Rotterdam: TEJO, 1995. 127p. ISBN 83-900118-3-2. 21cm. Mapoj. La nova eldono, kun 812 adresoj el 71 landoj. 24,00 gld.

Paŝoj al pli alta ŝtupo. Komp. Lu Chuanbiao, Wang Hanping. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1994. 195p. ISBN 7-5052-0119-0. 19cm. Facilaj artikoloj, plejparte aperintaj en la rubriko "Por komencantoj" de *El Popola Ĉinio*. 18,00 gld.

Perloj de l'saĝo. El la skriboj de Bahá'u'lláh. Komp. Kambiz Poostchi, Peter Spiegel. El la angla trad. Bahaa E-Ligo. Frankfurt am Main: BEL, 1994. 56p. ISBN 84-85238-88-5. 21cm. 9,00 gld.

Plejo. Muzika - eto sny. Ivan Naumov. Moskva: Impeto, 1995. 49+55p. ISBN 5-7161-0016-3. 20cm. Dulingva poemaro (E-rusa), kaj du anglaj poemoj. 10,50 gld.

Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj. Petr Chrdle (1946). Dobřichovice: KAVA-PECH, 1995. 40p. ISBN 80-85853-16-7. 20cm. Prelego de profesia uzanto de Esperanto. 3,90 gld.

Propra biografio de Karolo la IV-a, La. Trad. Josef Vondroušek. Dobřichovice: KAVA-PECH, 1995. 87p. ISBN 80-85853-15-9. 20cm. Aŭtobiografio de la plej estimata



Aŭstralio: "Toleremo" sen ĉinoj

46 aliĝintoj ĉeestis la 31-an kongreson de Aŭstralio E-Asocio (Southport, 30 jun.-6 jul.), kiun malfermis prezidanto de la Kvinlanda parlamento, Jim Fouras. Pri la kongrestemo, "Toleremo", prelegis Ronald C. Gates; Ralph Harry tributis al la 50-jariĝo de UN. Dek ĉinaj partoprenontoj ne ricevis vizon, malgraŭ plurfoja interveno de AEA-prezidanto Kep Enderby. En letero al la ministro pri enmigrado, Enderby esprimis la esperon ke je la 82-a UK (Adelajdo, 1997) oni ne devos kalkuli kun similaj problemoj. (*E-o sub la Suda Kruco*)

Francio: Tamen Thierry-staĝo

La forpasinta Jean Thierry intencis gvidi staĝon pri "Aŭtorinoj en Esperantio" en La Kvinpetalo (FR-86410 Bouresse, Francio) ĉi-aŭtune. Li ne plu povos ĉeesti — tamen prezentiĝos parto de liaj verkoj inter la 24-a kaj 28-a de oktobro, dank' al Michel Audibert, Georges Lagrange k.a.

Finnlando: Esperanta hejmpaĝo

La maldekstra ĵurnalo *Kansan Uutiset* — en kiu jam aperis felietone raportoj de Senad Ćolić el Sarajevo, tradukitaj el E-o de Kalle Kniivilä — igos sian novan komputilretan hejmpaĝon en la Tut-Tera Teksaĝo (angle *World Wide Web*) dulingva: finna kaj Esperanta. En la semajne ĝisdatigota Esperanta versio aperos aktualaj artikoloj pri finnlanda kaj internacia politiko. La adreso: <http://walli.uwasa.fi/yriytkset/ku/ku.html>. (K. Kniivilä)

Daŭras la informa efiko de la UK: aperis plurpaĝaj artikoloj en la porinstruistaj revuoj *Tempus* ("Ĉu E-o iĝos komuna eŭropa lingvo?") kaj *Opettaja* (pri la UK).

Germanio: Kohl apenaŭ kredas

Kiel raportite (jul.-aŭg., p. 138), multaj e-istoj leteris al kanceliero Kohl post lia memkontraŭdira eldiro "Ni ne volas Esperanto-Eŭropon, sed Eŭropon en kiu ĉiu gardas sian identecon." Laŭ respondoj verkitaj de liaj oficistoj, Kohl "komprenas la entuziasmon por E-o", sed "apenaŭ kredas ke E-o havus ŝancon fariĝi komuna lingvo de la eŭropanoj". Nome, "gravas ankaŭ la kompreno inter Okcidento kaj Oriento, inter Nordo kaj Sudo, kaj ĉi-kampe la angla jam sukcesis kiel mondlingvo por la ekonomio kaj scienco". (U. Matthias)

Rusio: E-Centro en Jekaterinburg

Informado pri E-o estis la intense diskutata ĉeftemo de la 17-a Urala E-ista Renkonto (22-23 apr.) en Jekaterinburg. Ĉi-okaze oni inaŭguris Esperanto-Centron, kiu estas malfermita en ĉiu labortago, kaj ĉiusemajne proponas kultur-teman "verdan lundon". (*La ondo de Esperanto*)

Slovakio: "Unueco en diverseco"

Tio estis la devizo de la internacia forumo "Etnoj kaj naturo" (Poprad, 24 jun.-4. jul.), motorata de e-isto Lev Medvedev, por kies subprogramoj scienca, regiona, eduka, folkloraj kaj religia registriĝis ĉ. 160 aliĝintoj, i.a. trideko da e-istoj. Esperanto estis unu el la kvar laborlingvoj. Aparta komuniko emfazis la ĉefan mesaĝon de la aranĝo, la neceson konservi la biologian kaj kulturan diversecon kiel unuecan tuton, kaj konstatis ke Esperanto, "kiel dua lingvo post la gepatra, helpas konservi la kulturan diversecon de la monda socio".

Kadre de la forumo, seminario omaĝis al la vivverko de la e-ista etnografo Tibor Sekelj, naskita en Poprad. En la ĉeesto de la urbestroj de Poprad kaj la jugoslavia Subotica (kie li pasigis la lastajn vivjarojn), memortabulo estis inaŭgurita sur lia naskiĝdomo. Ekspozicio el lia etnografia kolekto restis malfermita ĝis la fino de septembro. (L. Medvedev)

Usono: Hartford daŭre duba

La 26-an fojon Ŝtata Universitato de San-Francisko gastigis E-kursojn kadre de siaj someraj programoj. De la 26-a de junio ĝis la 14-a de julio intense studis E-on je kvar niveloj 51 studentoj ĉefe el Usono, Japanio, Kanado kaj Rusio, sub la gvido de Duncan Charters, Spomenka Ŝtimec, Atilio Orellana Rojas kaj Senjo Umeda. La kursojn iniciatis, organizis kaj jam kvaronan jarcenton ame vartas Cathy Schulze.

La plurnivelaj E-kursoj ĉe la Universitato de Hartford (Usono) logis 23 partoprenantojn (10-15 julio). Tamen, kiel ni raportis en majo (p. 100), la estonteco de la kursaro estas necerta, ĉar malfacilas kolekti la postulatan kvanton da kursanoj (30 personoj).

Centro por Evoluigo de Demokratio en Kalifornio (P.O.B. 1329, Martinez CA 94553, Usono) uzas Esperanton kiel unu el siaj laborlingvoj. (*Bukureŝta Informilo*)



Ĉinio: El Popola Ĉinio 45-jara

La redakcio de *El Popola Ĉinio* festis per te-kunveno, la 10-an de majo, la 45-jariĝon de sia revuo. Festparolis antaŭ ĉ. 200 gastoj (e-istoj, ĵurnalistoj, ses ministroj kaj eksministroj) TAN Xiuxhu, vic-ĉefredaktorino de EPC kaj vicprezidentino de Ĉina E-Ligo, kaj CHEN Yuan, prezidanto de ĈEL. Pri la jubileo raportis la centra kaj Pekina televido, same kiel deko da gravaj ĵurnaloj. (SUN Aiyun)



Eŭropa agado: EEU reaktivigu

Aktivuloj el EU-landoj diskutis en la Tampere UK pri pli efika kunlaboro kaj organiza strukturo. Sur la bazo de du proponoj (Mark Fettes kaj Itala E-Asocio) la kunvenintoj konkludis ke, "por reaktivigi la internan kunlaboron, unue la financaj aspektoj de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) devos esti reekzamenitaj". Elsbeth Bormann farigis nova prezidantino de EEU. (G. Greatrex, M. Cwik)



Foto: J.P. Cavelan

Politiko: Radikala manifestacio

Dum renkontiĝo de la ŝtatestroj de Eŭropa Unio en Kanno (Cannes) la 26-an de junio, duonmilo da homoj manifestaciis por aligo de Bosnio-Hercegovino al EU, laŭ iniciato de Transnacia Radikala Partio (TRP) kiun subtenis pli ol 500 parlamentanoj eŭropaj kaj naciaj. Nome de la partoprenantaj esperantistoj diverslandaj, Davide Tutino parolis pri "la neceso adopti federacian komunik-lingvon". Surfote, dekstre: franca eksministro pri homhelpaj aferoj, Bernard Kouchner, apud sloganbendo kun Esperanta stelo. (R. Triolle)

La 20-an de junio TRP akiris konsultajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kiel neregistara organizaĵo kun la rajto proponi rezoluciojn al la Ekonomia kaj Sociala Konsilio de UN. Laŭ la prezidanto de TRP, Jean-François Hory, la partio povos agi ekde nun pli efike por siaj celoj, i.a. por "internacia lingva demokratio". (Transnational)

Korespondado: Malpli da petoj

La UEA-servo peranta korespond-petojn, Koresponda Servo Mondskala (François-Xavier Gilbert, B.P. 6, FR-55000 Longeville en Barrois, Francio) ricevis malpli da petoj en la lastaj jaroj (692 en 1991, sed nur 407 en 1994). Tion kaŭzas kreigo de similaj servoj en pluraj landoj, sed certe temas ankaŭ pri nesufiĉa diskonigo de KSM fare de la Esperanta gazetaro kaj kursgvidantoj.

Lingvopolitiko: Pozitiva sinteno

Pri la pozicio de malpli parolataj lingvoj ĉe EU temis kolokvo titolita "Ĉu limoj al multlingveco? Lingvouzo kaj administra efikeco ĉe la institucioj de Eŭropa Unio" (Bruselo, 23. jun.), organizita de Nederlanda Lingvo-Unio, interregistara organizaĵo de Bel-

gio kaj Nederlando pri la nederlanda lingvo. Ĉeestis pluraj estraranoj kaj membroj de Flandra Esperanto-Ligo kaj Hans Erasmus el Nederlando. Laŭ raporto de Wim de Smet, vicprezidanto de FEL, la sinteno de la ĉeestantaj politikistoj estis "pli pozitiva rilate la eblojn de Esperanto ol antaŭ jaroj". (Horizontaal)

Semajnfina turismo: Recepto el Antverpeno

Ne serioza prelegaro kaj movadecaj kunsidoj, sed sperta E-lingva ĉiĉerono tra la kulturaj riĉaĵoj de Antverpeno: jen la "recepto" de la jam triafoje sukcesa Internacia Kultura Semajnfino (12-14 majo). 63 aliĝintoj el 7 landoj vizitis muzeojn diamantan, pres-artan kaj de Rubens, kaj ĝuis gastronomiaĵojn de Iwona Kocięba kaj Gerrit Berveling en la E-domo. Flandra E-Ligo (Frankrijkple 140, BE-2000 Antwerpen) jam preparas la kvaran Semajnfinojn, je simila dato en 1996. (I. Durwael)

Sennaciismo:

Rekomendo pri minoritatanoj

La 68-an Kongreson de Sennacieca Asocio Tutmonda (Maribor, Slovenio, 15-22 jul.) partoprenis 120 personoj el 26 landoj, malpli ol kutime. Al la kongrestemo "Tolero al minoritatanoj" dediĉigis tritaga simpozio, kun prelegoj de 5 kongresanoj kaj de 6 nee-istaj profesoroj el Slovenio kaj Kroatio. La kongresaj konkludoj rekomendas al Slovenio kaj ties najbaraj landoj preventi kreskon de maltoleremo al minoritatanoj, i.a. per starigo de servoj kiuj prizorgas kursojn pri dulingva edukado en familio kaj translimajn ferio-renkontiĝojn por sametnaj familioj. Akceptigis deklaro kiu esprimas malkontenton pri la nuna mondsituaĵo, kondamnas la senskrapulajn misuzantojn de potenco (speciale la francan registaron pro ties nukleaj provoj) kaj invitas plikonsciigi pri la manipulado kaj ekspluatado fare de potenc-havantoj.

La venontjara Kongreso de SAT okazos en Sankt-Peterburgo, Rusio (13-20 julio 1996). (Sennaciulo, Z. Tišljär)

Universitatoj:

Rekorda E-fako amputita

La Esperanto-fako de Universitato ELTE en Budapeŝto rekordis en la studjaro 1994/95: ĝi varbis 20 komencantojn kaj instruis 15 studentojn je pli altaj gradoj. Ĉi-aŭtune 6 anoj de la internacia koresponda fako komencis sian kvinan semestron. Tamen, pro la financaj restriktaj kiuj nun plagas la hungarajn universitatojn, d-rino Ilona Koutny ne estis redungita por 1995/96, tiel ke nun d-rino Zsuzsa Varga-Haszonits restas la sola salajrata instruanto en plentempa posteno.

Novaj abonantoj!

Jen DONACO de

TAKE



Por verkado de interesa artikolo pri via profesio, via scienca aŭ teknika alternejo, vi ĝuos **unuvaran senpagan abonon al LA DOMO, la revuo de la profesioj kaj de la servoj.**

Sendu vian kontribuon al
**TAKE - LA DOMO RN 83
F - 68920 WINTZENHEIM**
TAKE aŭskultas "Pola Radio" en
ESPERANTO
PK 46 00977 VARSOVIO Polio

KOTIZTABELO DE UEA POR 1996

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Argentino/ <i>guldeno</i>	8	20	50	30	20	100
Aŭstralio/dolaro	12	31	78	47	31	156
Aŭstrio/ŝilingo	100	245	610	365	245	1220
Belgio/franko	290	720	1800	1145	765	3600
Brazilo/ <i>guldeno</i>	8	20	50	30	20	100
Britio/pundo	6	15	38	24	16	76
Bulgario/ <i>guldeno</i>	8	20	50	30	20	100
Ĉeĥio/krono	135	340	850	510	340	1700
Danio/krono	55	140	350	225	150	700
Finnlando/marko	45	110	270	170	115	540
Francio/franko	50	120	300	190	125	600
Germanio/marko	14	35	87	55	37	174
Greklando/drakmo	1400	3600	9000	5700	3800	18 000
Hispanio/peseto	850	2100	5300	3400	2300	10 600
Hungario/forinto	650	1600	4000	2400	1600	8000
Irlando/pundo	6	14	35	22	15	70
Islando/ <i>guldeno</i>	16	39	97	58	39	194
Israelo/ <i>guldeno</i>	13	32	80	48	32	160
Italio/liro	13 000	32 000	80 000	51 000	34 000	160 000
Japanio/eno	1150	2880	7200	4320	2880	14 400
Kanado/dolaro	12	31	78	47	31	156
Korea Resp./ <i>guldeno</i>	12	31	77	46	31	154
Nederlando/ <i>guldeno</i>	16	39	97	61	41	194
Norvegio/krono	60	150	380	230	150	760
Nov-Zelando/dolaro	15	38	95	57	38	190
Pollando/ <i>guldeno</i>	8	20	50	30	20	100
Portugalia/eskudo	1000	2400	6000	3800	2500	12 000
Rusio/ <i>guldeno</i>	8	20	50	30	20	100
Slovakio/krono	150	380	950	570	380	1900
Sud-Afriko/ <i>guldeno</i>	14	35	88	53	35	176
Svedio/krono	70	170	430	275	185	860
Svislando/franko	12	31	77	46	31	154
Usono/dolaro	9	23	58	35	23	116
TARIFO A/ <i>guldeno</i>	10	26	64	38	25	128
TARIFO B/ <i>guldeno</i>	8	20	50	30	20	100

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio.

TARIFO A: Honkongo, Malto, Singapuro, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Por ĉiu validas la nuna loĝlando. La kotizoj validas por la kalendara jaro.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)

MA(-T): Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*

DM: Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

Per- sone



Corsetti-Löwenstein:

En nova redakcio

Anna Löwenstein kaj Renato Corsetti fariĝis redakcianoj de *The Bilingual Family Newsletter*, anglalingva revuo pri plurlingva edukado de infanoj (vd. anoncon sur la interna dorskovrilo de nia aprila numero). Ili ĝis nun kunordigis ankaŭ la bultenon *Cirkulaĵo por esperantlingvaj paroj kaj familioj*, kiun transprenas Anna Besenyei (Szerémi u. 21 IV 20, HU-1117 Budapeŝt, Hungario).



Edward Symoens

Symoens 80-jara

Edward Symoens, Honora Membro de UEA, fariĝis 80-jara la 17-an de septembro. Instiginto de la movado en afrikaj landoj kaj ĝia kun-renoviginto en Flandrio, kiu prezidis Flandran E-Ligon kaj Internacian Ligon de E-istaj Instruistoj, li estis festata per solena akcepto en la Antverpena E-domo la 23-an de septembro. (Kelkajn horojn pli frue, antverpenanoj festis alian jubileon: la 25-jariĝon de la nuraj oficialaj E-kursoj en Belgio.)

Ten Haaf:

Doktoro prezidas TEJO-n

La nova prezidanto de TEJO, Danny ten Haaf, defendis la 6-an de septembro, en Lejdeno, sian doktoran disertaĵon pri fiziko. La anglalingva "Pri la magneta fazodiagramo de la Hubbard-modelo" aperis ankaŭ libroforme, kun resumo nederlanda kaj Esperanta.

Josep ALBERICH i JOFRÉ (1904-1995) mortis la 9-an de aprilo en Barcelono. Antaŭ la militaj jaroj li aktivis kiel E-instruisto kaj sekretario de Kataluna E-ista Federacio. Post la milito li kunfondis la societon Stelo de Paco kaj dum 14 jaroj estis fakdelegito pri komerco.

G.E. CANNEMEYER-HOOGLAND (1912-1995) forpasis en Zwolle (Nederlando) la 25-an de junio. Ŝi estis dumviva membro de UEA.

Alfred DIETRICH (1926-1995), fondinto de loka E-grupo, emerita fervojisto, mortis la 2-an de aprilo en Elsfleth (Germanio).

Joaquim DO COUTO (1900-1995), delegito pri skoltismo dum 23 jaroj, dumviva membro, honora prezidanto de Niterói E-Klubo (Brazilo), forpasis la 14-an de februaro.

Gunnar GUSTAVSSON (1908-1995), dumviva membro, delegito dum 25 jaroj en Halmstad (Svedio), mortis antaŭ nelonge.

Johanna M. van den HENGEL (1908-1995), dumviva membro, mortis la 28-an de aprilo en Roterdamo, kie ŝi estis vicdelegito dum kvarona jarcento, kaj sekretario de la loka klubo Merkurio.

KOSEKI Yosio (1908-1995), profesoro de Universitato Meizi, estrano de Japana E-Instituto, forpasis la 8-an de julio.

LEE Ok-won (1928-1995), ano de la direktoraro de Korea E-Asocio kaj filiestro de KEA en Taejon-Ch'ungnam, forpasis la 7-an de majo.

József MÁTYÁS (1923-1995), prezidanto de la fervojista fakgrupo en Debrecen ekde la 50-aj jaroj, honora membro de Hungara E-Asocio, iama delegito pri fervojoj, plurjardeka E-instruanto, forpasis la 2-an de aprilo.

Canko MURGIN (1921-1995), dumviva membro en Sofio, geografo, mortis en junio. Li aŭtoris multajn eseojn kaj artikolojn historiajn, esperantologiajn aŭ literaturajn, kaj kompilis la ampleksan poezian antologion *Rozo kaj glavo* (1987).

Luís de OTAOLA FAÓN (1903-1995), esperantisto ekde 1918, delegito kaj multfoja prezidanto de la grupo en Bilbao, ofta kursgvidanto, forpasis la 9-an de aprilo.

Janko PALI (1897-1994) mortis en Korfu (Grekio) la 19-an de oktobro 1994. Naskita en Izmiro (Turkio), li estis inter la unuaj albanaj adeptoj de Esperanto, kiun li lernis en 1926. Li verkis neeldonitan lernolibron kaj faris tradukojn el la albana poezio.

Horst SPIRAT (1928-1995) mortis la 24-an de marto. Li eklernis Esperanton en militkaptitejo, kie angla oficiro esperantista helpis lin per nutraĵoj. En 1955 li kunfondis kaj poste gvidis Sudbavaran E-Ligon. Inter 1967 kaj 1978 li prezidis la klubon en Munkeno, kiu laŭ lia iniciato en 1967 fariĝis jure registrita societo. Li organizis Germanan E-Kongreson en 1968 en Munkeno. Post translokiĝo al Italio, li agadis en la regiono Veneto kaj fondis grupon en



Horst Spirat

Tregnago. Li estis delegito pri tekniko ekde 1955.

Gustav STENHOLM (1917-1995), delegito en Skara (Svedio), aktivulo de Kristana E-Ligo Internacia, forpasis lastatempe.

Erkki VÄISÄNEN (1913-1995), delegito pri psikologio dum dudeko da jaroj, mortis antaŭ nelonge en Loimaa (Finnlando).

OFICIALA INFORMILO

NOVA DUMVIVA MEMBRO
Germanio: J. Prager.

SOCIETO ZAMENHOF 1995
Nederlando: Danny ten Haaf. Svedio: Roland Lindblom. Sume por 1995 ĝis nun 264 SZ-anoj.

DONACOJ 1995 (gld.)
ĝis la 31-a de aŭgusto

Fondaĵo Afriko: Italio: D. Trombetta 2400,00. Usono: W.R. Harmon 50,00. Sumo ĉi-jara 6944,07.

Fondaĵo Ameriko: Finnlando: T. Sormunen 200,00. Nederlando: A.P.G. Ploeg 100,00. Sumo ĉi-jara 1012,53.

Fondaĵo Canuto: Anonime: 100,00. Brazilo: M. Pozder Almada 300,00. Japanio: (por aziaj e-istoj): Miyazaki E-Kai 34,90; Nagano Esperanto-Kenkyukai 73,20; Y. Hukahori 36,60; Y. Itou 69,80; M. Iwai 36,60; I. Katou 36,60; K. Kobayasi 35,50; S. Mitukawa 18,30; H. Onda 34,41; T. Oohara 35,50; Y. Sawaya 36,60; T. Tadaisi 73,20; H. Takahasi 36,60; M. Toyoda 54,90; S. Yosikawa 36,60; K. Ueno 35,50. Nederlando: S. Milojević 560,15. Sumo ĉi-jara 9155,42.

Ĝenerala Kaso: Danlando: G. Jørgensen 56,00. Nederlando: G.F. Makink 1000,00. Svedio: U. Luin 40,50. Diversaj malgrandaj 3,00. Sumo ĉi-jara 3904,10.

Konto Espero: Francio: Franca Evangelia E-Ligo 187,90. Usono: E.M. Eddy 16,60. Sumo ĉi-jara 1548,26.

Junulara Fondaĵo: Germanio: M. Vitalyos 200,00. Sumo ĉi-jara 200,00.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Britio: B. Clarke 12,25. Sumo ĉi-jara 1005,76.

Volontula Fondaĵo: Kanado: J.W. Jarasz 14,76. Sumo ĉi-jara 1173,76.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

RENTO JE DEPONOJ MALALTIĜAS AL 4% EKDE LA 1-a DE NOVEMBRO

Pro la evoluoj en la monmerkato dum la lastaj du jaroj, UEA estas devigata malaltiĝi la renton je la ŝpardeponoj de la membroj, de la ĝisnunaj 5% al 4% ekde la 1-a de novembro 1995. Tio koncernas ankaŭ la malnovajn deponojn, kiuj maturiĝos post la 31-a de oktobro. Ĉi tiu paŝo estas aparte necesa pro la alie bonvena grandeco de la deponitaj sumoj (nun pli ol 760 000 NLG).

Kiril Draĵev (1904-1995)



Kiril Draĵev, Honora Membro de UEA ekde 1984, grafikisto, ĵurnalisto, mortis en Sofio en majo.

Draĵev naskiĝis la 3-an de majo 1904. Lerninte Esperanton en 1921, li fondis E-societon en sia hejmurbo. Li estis plurfoje estrarano de E-Societo de Sofio, kursgvidanto, LKK-ano de la Universalaj Kongresoj en Sofio (1963) kaj Varno (1978), parolanto (1937-42) kaj redaktoro (1956-1976) de Esperantaj elsendoj de Bulgara Radio. Li redaktis la Esperantan eldonon (1964-68) de luksa turisma revuo dumonata, aperanta en kvin lingvoj, *Ripozoĵ*.


Malmultaj ludis tiel gravan rolon en la historio de la Esperanta teatro kiel Kiril Draĵev. Li kunfondis kaj de 1957 dum pli ol kvarona jarcento gvidis Bulgaran Esperanto-Teatron. Por ties repertuaro li tradukis pli ol 20 dramojn de mondkonataj klasikuloj kaj de bulgaraj aŭtoroj, kiuj estis prezentitaj en diversaj kongresoj, precipe en la UK-oj inter 1959 kaj 1983. Inter ili estas: *Ĉasantoj de oficoj* de Vazov (1959), *La du ŝtelistoj* de Nuŝiĉ (1966), *La urso* de Ĉeĥov (1966), *Akridoj* de Kostov (1968), *Mandragoro* de Makiavelo (1971), *La servisto de du mastroj* de Goldoni (1975), *La lernejo de virinoj* de Moliero (1976) kaj *La barbiro de Sevilla* de Beaumarchais (1974); ĉi lastan teatraĵon Unuiĝo Franca por Esperanto eldonis en 1985 kiel literaturan numeron de sia revuo.

Draĵev funkciis kiel fakdelegito de UEA ekde 1958, unue pri belarto, poste pri teatro. Pro sia Esperanta laboro li ricevis ankaŭ altajn ŝtatajn ordenojn.



La 17-an de aŭgusto forpasis en Benino vidvino ESSOU SANDO Florencia Perpetua (1908-1995), avino de delegito ESSOU Sébastien. Ŝi estis tre afabla, helpema, donacema — se ne praktike, tamen spirite vera esperantistino.

Anoncetoj



Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon ĉe la interna kovrilpaĝo.

Esperantistoj en la tutmonda Universitato de la Tria Aĝo, ĉu instruantoj ĉu aktivaj lernantoj. Ni jam konas kvindek en 12 landoj sed mankas ĉefe Azio, norda Eŭropo, Afriko. Donu kaj ricevu informojn per nia *Ligilo* ĉe 17 The Grange, Shepherdswell, DOVER CT15 7QB, Britio.

S-ro Li Ya Min deziras korespondi kun vi pri ĉiuj temoj. Adreso: P.O. Box No. 5, Qiqihaer CN-161006, Ĉinio.

Korespondi deziras tutmonde:

S-ino Sabina Grebocka, Oś. Sikorskiego 31 B/10, PL-44-240 Żory, Pollando (34 j., ĉiuj temoj).

S-ino Wanda Sitek, ul. Floriańska 16/24, PL-44-217 Rybnik-17, Pollando (36 j.)

S-ro Miĥail Ŝelestov, st. Sovetskaja 18-6, BY-222160 Ĵodino, Bjelorusio (24-jara studento).

Esperanto-Societo Vekiĝo (BG-9707 Ŝumen, Bulgario) solenas sian 90-jariĝon. Geamikoj en la mondo, bonvolu nin saluti!

Tranokteja kaj kurseja entrepreno Källkullen. Carola Antskog kaj Anna Ritamäki nun havas faksilon je +358/423-246. Nova telefonnumero de Anna estas +358/21-2361682.

STR-ANGULO

Centoj da E-libroj rubujen

La Valencia ĵurnalo *Levante* malvualis ke la urba magistrato forĵetis centojn da ekzempleroj de la libreto *Kiel fidela hundo*, senpage distribuita dum la Valencia UK en 1993. La aŭtoritatoj pravigas sin per eraroj “kaŭzitaĵ de maloftaj karakteroj” (la supersignoj) kaj per la aserto ke, “jam sendita al 62 landoj”, la libro ja plenumis sian rolon.

Kiel fidela hundo estas banala teatraĵo fuŝe esperantigita: oftas elementaj eraroj kiel akuzativ-mankoj kaj okulfrapaj nacilingvismoj. Tio ne malhelpis al la LKK eldoni la libron en 3000 ekzempleroj kaj ĝin disdoni inter la kongresanoj. Bedaŭrinde *Amkantoj*, brila traduko de Abel Montagut el poemoj de la klasika Valencia poeto Ausias March [18,90 gld. ĉe UEA], bele eldonita por la sama okazo, ne ĝuis la saman privilegion.

Joan Marimon, Hektor Alos
(Laŭ Kataluna Esperantisto)

Vizitu vian propran domon ĉe Nieuwe Binnenweg 176 en Roterdamo dum

MALFERMA TAGO

sabaton la 18-an de novembro 1995

La Centra Oficejo
40 jarojn
en Roterdamo

- ★ Konatiĝu kun la domo kaj ĝiaj laborantoj
- ★ La tutan tagon ĉeestos **William Auld**, kiu antaŭ 40 jaroj pakis la Centran Oficejon en Heronsgate por transporto al Roterdamo. Kaptu la okazon pliriĉiĝi per lia aŭtografo!

- ★ Senhanta prezentado de Esperanto-filmoj
- ★ Aĉetante en la libroservo, vi ricevos rabaton de 10% (kaj ŝparos la sendokoston)
- ★ Ankaŭ surprizaj ofertoj
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj



Roterdamo imponas per moderna arkitekturo kaj abunda kultura vivo. Pasigu plenan semajnfinojn en la ĉefurbo de Esperantujo! Hotelo Van Walsum estos je via dispono por tranoktado (vd. Jarlibron 1995, p. 242).



Tendaraj tagoj

tri kajeroj

- specife por junuloj 10- ĝis 14-jaraj
- speciale emfazas parol-kapablon
- allogo ilustrita de Pavel Rak
- kun notoj por instruistoj



Verkis Stefan MacGill.
Eldonis ILEI/UEA/HJEA.



Prezo: 12,00 gld. por la unua, 15,00 gld. por la dua kaj 18,00 gld. por la tria kajero. Triona rabato ekde 3 ekz. ĉe UEA.

Edward Symoens:

BIBLIOGRAFO DE DISERTACIOJ PRI ESPERANTO KAJ INTERLINGVISTIKO



Tiu ĉi grava informfonto (1989; 159p.) estas nun ĝisdatigita per 63-paĝa suplemento. Kune ili priskribas preskaŭ 250 universitatajn studojn.

Baza libro 21,00 gld.; suplemento 7,20 gld. Oferto: Ambaŭ kune 23,50 gld.

LA PLEJ KONATA LIBRO PRI EFIKA TEMPOUZO, NUN EN ESPERANTO!



Lothar J. Seiwert:

La aboco de tempoplanado

Roterdamo: UEA 1995. Serio *Konsilaroj por Aktivuloj* n-ro 2. 53 p. Prezo: 7,50 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.



Tibor Sekelj

Kumeŭaŭa

Ree haveblas ĉi tiu populara romaneto tradukita en dudekon da aliaj lingvoj!

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994 (2-a eld.). 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. 15,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

Ankaŭ vi povas kontribui!

Fondaĵo Ameriko



helpas al la Esperanto-movado en Centra kaj Suda Ameriko. Vian donacon vi povas sendi pere de la kotizperanto en via lando aŭ rekte al UEA. Dankon!

“Imagoj pri Afriko:
Kontinento de espero aŭ de malespero?”

KVARA AFRIKA KONGRESO DE ESPERANTO

28 decembro 1995 – 2 januaro 1996

ĉe Kilimanĝaro en Tanzanio

La kotizo de 620 NLG inkluzivas ses trankonkresaj ekskursojn: ekzemple 5-taga migrado al Kilimanĝaro (690 NLG) kaj 3-taga tendosafario (620 NLG). Karavana flugo el Amsterdamo, kun ekflugo la 26-an de decembro kaj reflugo la 9-an de januaro, kostas 1980 NLG; eventuale estos aliaj konektaj flugoj el aliaj urboj en Eŭropo, se sufiĉos por tio la nombro de aliĝintoj. Informiĝu ĉe la Centra Oficejo de UEA.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto rekomendinda por komencantoj bela kaj moderna diversa kaj amuza interesa por ĉiuj

KŜTAKTO estas gazeto por ĉiu, kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KŜTAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1995 **KŜTAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1996

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	125 frankoj	Nederlando	41 guldenoj
Aŭstrio	245 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	765 frankoj	Hispanio	2300 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	32 guldenoj	Portugallio	2500 eskudoj
Britio	16 pundoj	Italio	34000 liroj	Svedio	185 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	31 dolaroj	Usono	23 dolaroj

Granda rabato por grupaj abonoj ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!

Sanigas nekuraceblajn malsanojn, bonigas farton, donas energion, natura kaj facile lernebla

YUMEIHO-TERAPIO

Orienta Speciala Diina Masaĝo

Koksoston Ĝustiga Premkneda Terapio de profesia terapiisto Masayuki Saionji.

Dua eldono, reviziita kaj grandigita, riĉe ilustrita. Prezo 21,00 gld. (rabato 33% por min. 3 ekz.).

Mendebla ĉe la Libroservo de UEA.

Videobendon en diversaj sistemoj (en Esperanto kaj aliaj lingvoj) mendu por 80 gld. ĉe:

Internacia Instituto de Preventiva Medicina Praktiko, CPO Box 405, Tokyo, 100-91, Japanujo.

Jen unika ŝanco

Ricevu senpage 3 sinsekvajn numerojn de la gazeto *Brazila Heroldo*, kiu laŭ la junia numero de la revuo *Esperanto* “nepre meritas ankaŭ internacian atenton”. Nur poste vi pensos pri abono.

Brazila Heroldo

Aperas monate

E-movado	Politiko	Sporto	Informadiko	Diversaĵoj
Kulturo	Ekonomio	Scienco	Turismo	

Suplementoj

Facila – Trimonata gazeto por komencantoj

Panoramo de Interlingvistiko kaj Esperantologio – Jara kajero

SENDU VIAN NOMON KAJ ADRESON AL
ZAMENHOF EDITORES
CAIXA POSTAL 1887
01059-970 SAN-PAULO-SP
BRAZILIO